

# HORIZONTO

III-a JARO N-o 13 (1)  
JANUARO-FEBRUARO 1978

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



PALACO DE KONGRESOJ

STILA LECIONO

LA Batalo de l'Pac-Emuloj

«HORIZONTO» DUJARA

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

# HORIZONTO

Direktorino  
Inés Gastón  
Redakta Komitato  
Salvador Gumá  
Juan Régulo  
Jean Thierry  
Red. kaj Adm.  
Inés Gastón  
P.º Marina Moreno, 35  
Telf. (976) 22.05.21  
Zaragoza-1 (Hispanujo)  
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj  
Dumonata revuo  
Presita en Zaragoza  
ĉe "Tipografía C. Boloix"  
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8  
Leĝa Depono Z-133-76  
N.º 1 - Januaro - Februaro 1978

## EN HAVO

«HORIZONTO» DUJARA (Salvador Gumá)  
PADERBORN DENOVE Raportas (Ivo Lapenna)  
LA BATALO DE L' PAC-EMULOJ (Jean Thierry)  
«NOVAVENTA» KONFORMISMO (Jean Thierry)  
LA INTERNACIECO DE ESPERANTO  
KAJ LA KARAKTERO DE LA HIND-  
EŬROPAJ ELEMENTOJ EN GI  
Prelego (Fabrizio A. Pennacchietti)  
EL NIAJ FAKAJ ORGANIZAJOJ  
Internacia Jura Revuo  
DEKLARO DE LA PREZIDINTO DE LA  
3-a INTERNACIA KONFERENCO DE  
NEM  
Noto de la Redakcio  
BELETRO  
La Promenejo de la du Amantoj (trad.  
G. Waringhien)  
Radioamatoroj (trad. E. Mingo)  
Leciono de anatomio (trad. J. Smykalski)  
Repaciĝo (trad. J. Smykalski)  
Stila Leciono (Zora Heide)  
Maljustaĵo al infanoj (trad. Anna  
Dratwer)  
Per Forto de l'Kanto (J. Kohen-Cedek)  
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)  
Redaktas (Ivo Lapenna)  
TRA LA ESPERANTO GAZETARO Ra-  
portas (Jean Thierry)  
LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas  
(S. Gumá kaj G. Mora i Arana)

## KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Ad-  
ministracio: Inés Gastón, Paseo Marina  
Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĉk.  
Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ  
la sekvantaj.

## PERANTOJ

Aŭstrujo:  
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020  
GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono:  
160,— S.

Britujo:  
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON  
N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:  
Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700  
BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Biku-  
ben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono:  
60,— D Kr.

Finlando:  
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101  
KUOPIO 10, Pĉk KU 152801-5. Jarabono:  
38,— F. Mk.

Franco:  
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,  
F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V.  
Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:  
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5,  
D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120  
854-301. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:  
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave.,  
NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro.  
040-753362-40, Nacia Banko de Greklando  
Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.

Hungario:  
Tibor Szabadi, Pf. 66, H-8800 NAGYKA-  
NIZSA. Jarabono: 180,— Ft.

Israelo:  
Ben-Alier Jehiel, P. O. B. 379, PETAH  
TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8.  
Jarabono: 84 izr. liroj.

Kanado:  
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO,  
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:  
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L.  
OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse  
d'Épargne de l'Etat). Jarabono: 380, luk-  
semburgaj frankoj.

Rumanujo:  
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502  
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el  
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando  
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel  
perantoj, bv. sin turni al la direktorino

## PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.  
ESPLUGAS DE LLOBREGAT  
(Barcelona - Hispanujo)

Gi plenumis du jarojn. Juna, freŝa, vigla kaj sincera, ĝi ludas ĝustatempe tre gravan rolon en nia movado. Pro kurioza koincido ĝi naskiĝis en la sama lando de DONKIĤOTO por denunci la intrigadon, signi la malsincerulojn, defendi la ofendatojn, rebati la kalumniojn, malhelpi la submanovrojn kaj precipe reaserti, certigi kaj diskonigi tra la mondo la partipolitike neŭtralan kvintesencon de Esperanto.

Lingvo destinita al universaleco, destinita servi ĉies idealojn, ĉies doktrinojn, ĉies politikajn kredojn, devas esti senmakula, senreligia, senpolitika, senpartia, absolute sendependa, do neŭtrala. Tial mian propran kredon mi neniam atribuis al Esperanto. Respekton al ĝi!

Estas evidente, ke lingvo celanta universalecon, lingvo, kiu jam etendis la radikojn ĉien, portas en ĝi embrion de humaneco, de homa humaneco, de popolunuigo. Se pro la malsamaj lingvoj mi persone en okazo ne povis interŝanĝi eĉ unu vorton kun ali-landaj homoj sidantaj apud la sama tablo, Lingvo Internacia forigas la baron kaj aŭtomate ebligas la liberan interparolon, la homan interkonatiĝon, la homan unuecon.

Eble tial la diversaj diktatoroj — same estintaj kiel estontaj — sisteme malamas kaj ĝismorte persekutas Esperanton kaj ĉion al ĝi ligitan ĉar ĉio universala, ĉio iranta rekte en la koron kaj menson de ĉiu homo, ankaŭ rekte kontraŭas, baras kaj malhelpas la ekziston de ĉiu malvasta, premata kaj sufokata mondoparto, kie la leĝo estas la arbitro, kaj la justeco estas la krimo. Sendepende de la politika signo, Hitler kaj Stalin konsideris nin ekstermindaj dangeruloj, kio, el ilia maljusta pozicio, estis vera.

La politiko neniam estis klara kaj sincera; ĝin distingas la dusenceco. La politikistaj deklaroj kaj interkonsentoj enhavas kutime duoblan subsignifon. Tial la pompaj vortoj fluas rivere de ĉiu flanko, dum la favoraj faktoj nur gutete alfalas aŭ eĉ ne alfalas.

Al la absoluta neŭtrala kvintesencon de Esperanto, respondas absolute neŭtrala Universala Asocio ligita al nenia politika koncepto ĉar nur tiel ĝi povas libere kaj amike rilati kun la heterogena homaro. Oni povas uzi Esperanton por ĉia celo; oni povas havi eĉ asociojn, kies ĉefa karaktero estas, en iliaj plej diversaj nuancoj, la politiko, la filozofio, la religio aŭ alia branĉo de la homa penso.

Esperanto, destinita al ĉiu homo, devas servi ĉies interesojn; ĝi estas komunikilo universala pruvinta jam milfoje sian taŭgecon; sed estas ne pardoninda eraro maldistingi la du facetojn: Esperanto, senkaraktera, absolute neŭtrala, preta servi ĉiun homon kaj ĉion imageblan, kaj Universala Esperanta Asocio, ankaŭ neŭtrala, kiu devas uzadi Esperanton ekskluzive kaj nur por la progresigo de Esperanto, sendepende de ĉio fremda al ĝi. El la praktika vivo, mi citu krudan ekzemplon: Butikistoj kaj makleristoj tre avare eldiras siajn kredojn al la klientaro, ĉar ili povus vundi ties sentojn, kio kaŭzus misrilatojn kun la sekva malprofito. Se la unuaj esperantistoj ligus ian politikaĵon al Esperanto, tre certe ĝi ne estus atinginta sian naŭdekan jaron.

Estas evidentege, ke Esperanto ne naskiĝis kaj la adeptoj ne oferadis sin por ke la interlanda komercado faciliĝu; la tiel nomata «interna ideo», sento de humaneco, de homa unueco, rezultas ne eviteble kiel ni indikis pli supre, el la lingvo mem; el la rekta, libera, interpola komunikigo kreanta senton de supernacia civitaneco, kion malveraj savantoj abomenas

Sajnas ke la nunaj gvidantoj de la Universala Asocio preteratentis tion; ili malrespektas ĝian politikan virgecon; ili provas per deklaroj kaj mildaj vortoj kaŝi sian intencon, sed ni ne forgesis ke

Eĉ se per silko, simio sin vestas,  
Simio tamen ĝi restas.

Malgraŭ ĉio, se ni konstatus ke ia grava politika partio, influite de la jam per politiko ŝmirita Universala Asocio, alprenis Esperanton, instruas ĝin al sia membraro kaj uzadas ĝin vaste kiel propran lingvon, tiam ni povus kompreni. Baldaŭ ni vidos novajn burĝonojn ĉirkaŭ tiu fokuso kaj la venko estus preskaŭ je manatingo; sed nia jam matura historio instruas, ke ĝis nun neniu registaro nek grava politika partio volis agnoski praktike Esperanton. Neniu, ĝis nun faris decidan ekpaŝon. Aŭdiĝis nur pompaj vortoj, brilaj paroladoj, bondeziroj, laŭdoj kaj honoroj, kio, kiel bela irizita bobelo iom leviĝis, ŝvebis dum momento kaj tuj krevis postlasante nenion.

Dume, «Horizonto» dejoras avertante pri la mensogoj, akceptante kaj publikigante liberajn opiniojn, denuncante manovrojn, diskonigante faktojn kaj defendante la neŭtralecon de nia komuna lingvo kaj insiste postulante la revenon de Universala Esperanto-Asocio al ĝia laŭstatuta partipolitika neŭtraleco. «Horizonto» estas la organo de la demokrataj esperantistoj kaj de la Zamenhofa esperantismo. Sinceraj adeptoj grupiĝu ĉirkaŭ «Horizonto», kiun ornamas literaturo kaj poezio. Oni protektu kaj vivigu ĝin por la prosperado de nia komuna, kaj ne banala celo, kiu dum naŭdek jaroj meritis klopodojn, nenombreblajn oferojn kaj lastatempe eĉ martirojn.

Salvador Gumá

## PADERBORN DENOVE

### *Scienca Konferenco*

Fine de novembro 1977 okazis plia Laborkonferenco en la Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn, FR Germanio. Prelegis dekkvino da fakuloj, inter kiuj Prof. D-ro H. Frank (Paderborn), Prof. D-ro I. Lapenna (Londono), D-ro Szerdahelyi (Buda-peŝto), D-rino Magda Saturova (Bratislava), Prof. M. Duc Goninaz (Aix-en-Provence), D-ro Hans Maitzen (Vieno), Prof. D-ro F. Pennacchietti (Venecio), S-ro R. Schulz (Minden), S-ro C. Gacond (La Chaux de Fonds).

La pritraktita temaro estis tre vasta: ekde strikte teknikaj demandoj, ekzemple pri la mezurado de instrusukcesoj laŭ kibernetikaj diagramoj, aŭ pri komputeraĵoj esploroj rilate la fonem-uzon en Esperanto-tekstoj — tra la pure lingvistikaj temoj, ekzemple pri la aktuala stato de «interlingvistiko» (kiu plu restas nedifinita), aŭ pri la tipologio de interhomaj lingvomodeloj, aŭ pri leksikologiaj principoj en dulingvaj vortaroj, aŭ pri nehindoeŭropaj elementoj en la Internacia Lingvo — ĝis la pli vastaj filozofiaj aŭ juraj demandoj, ekzemple pri la filozofiaj konsideroj rilate la strukturon de la Internacia Lingvo, aŭ pri la juraj aspektoj de la lingva problemoj en la EEK. La plimulto de la prelegoj sendube estis sur tre alta scienca nivelo, sed la tuta programo estis tiel lacige plenŝtopita, ke bedaŭrinde restis neniom da tempo por iom serioza diskuto. Kaj diskuto ja estis vere necesa, precipe post kelkaj el la prelegoj, por fine reklarigi kaj fiksi la ĝustan pozicion de la Internacia Lingvo ne nur el lingvistika, sed ankaŭ el sociologia, politika, psikologia kaj aliaj vidpunktoj, kiujn la koncernaj prelegintoj komplete malatentis.

La dua rimarko rilatas al la loko. Parto de la prelegoj okazis en la novaj ejoj de la Kibernetika Instituto en la Universitato, do en konvena loko por scienca konferenco, sed la aliaj prelegoj devis okazi en aparta ĉambro de la gastejo «Bareleto», do en loko absolute maltaŭga por tiaspeca prelegserio. Krome, la ĉambro estis tre malgranda, sen la necesaj teknikaj faciligoj, kaj la servado de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj eĉ dum la prelegoj mem estis pli ol ĝena (por ne uzi pli fortan esprimon). Nur la grandanimeco de la prelegantoj kaj la vere amika agordo iel savis la aferon. Eble helpus la organizantojn, se estontece ili observus la konsilojn entenatajn en *Retoriko*, precipe sur p-oj 194-198.

La tria rimarko koncernas la dulingvecon. La oficialaj lingvoj de la Konferenco estis la germana kaj Esperanto. Diference de la antaŭa Konferenco (1976), kie tre kontentige funkciis simultana interpretado (en alia ĉambro oni povis vidi la preleganton sur televida ekrano kaj aŭdi nur la tradukon), ĉi-foje interpretado preskaŭ komplete forestis.

Malgraŭ tiuj mankoj, la Konferenco estis sukcesa, sed certe ne tiel bona, kiel la pasintjara.

### *Eŭropa Klubo*

Ekster la kadroj de la Konferenco okazis la jara kunveno de la Eŭropa Klubo, al kiu apartenas ne nur esperantistoj, sed ankaŭ multaj personoj, kiuj ne scias la Internacian Lingvon. La ĉefa punkto de la tagordo estis la projekto de Perspektiva Agadprogramo por la Solvo de la Lingva Problemo en Eŭropo, prezentita de Prof. D-ro I. Lapenna (v. la tekston en *Horizonto* n-ro 6/77, p-oj 122-127). Ĉar plian fojon mankis tempo por pli detala diskuto, la kunveno unuanime decidis akcepti la projekton kiel provizoran gvidlinion por agado kaj kiel bazon por ellaboro de la definitiva Programo. Prof. D-ro. H. Frank konsentis funkcii kiel prezidanto de la Eŭropa Klubo kaj gvidi ĝin ĝis la sekvanta jara kunveno, kiu verŝajne okazos jam post 4-5 monatoj. Li meritas apogon de ĉiuj, kiuj samopinias, ke la lingva demando en Eŭropo urĝe postulas solvon laŭ la ideoj entenataj en la provizora Programo. Espereble, la gvidantaro de la Klubo baldaŭ komencos ĝin realigadi.

### *Podia Diskuto*

Tre sukcesa estis la podia diskuto, same tiel ekster la kadro de la Konferenco, en luksa salonego en la centro de Paderborn. Prof. D-ro. I. Lapenna enkondukis la temon «Unuiĝo de Eŭropo kaj Homaj Rajtoj — Sancoj kaj Problemoj». Partoprenis la reprezentantoj de la tri ĉefaj politikaj partioj de FR Germanio, Prof. D-ro H. Frank kaj D-ro H. M. Maitzen, kiu ankaŭ bonege interpretis el la Internacia Lingvo en la germanan. Ĉeestis sepdeko da personoj.

En la enkonduko kaj en la posta diskuto estis aparte menciitaj la rajtoj ligitaj al libera komunikado kaj la edukado al internacia kompreniĝo (art. 19 kaj 26 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj). Estis emfazite, ke eĉ en la demokrataj landoj apartenantaj al EEK kaj, pli vaste, al la Eŭropa Konsilantaro, la realigon de tiuj rajtoj grave obstaklas la lingvodiverseco. La reprezentantoj de la tri partioj konsentis kun

la opinio de la enkondukinto de la diskuto, ke la sola realeca solvo estas la ĝenerala enkonduko kaj apliko de la nacie kaj partipolitike neŭtrala Internacia Lingvo por la bezonoj de translima komunikado kaj por edukado al internacia kompreniĝo ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta mondo. Ili aldonis plurajn jure rekonitajn rajton, ekzemple la rajtojn je libereco kaj sekureco, kaj la rajton je libera moviĝo (art. 3 kaj 13 de la UD), kiujn pluraj ŝtatoj krude malobservas kaj kiuj postulas energian protekton. Post la diskuto inter la partoprenantoj sur la podio, sekvis multaj demandoj fare de la publiko, al kiuj respondis unuopaj diskutintoj.

Ciuj menciitaj aranĝoj elvokis grandan interesiĝon ne sole en Paderborn, sed ankaŭ aliloke. El vidpunkto de publika informado kaj publikaj rilatoj, kaj la Konferenco kaj la kunvenoj ekster ĝiaj kadroj sendube havis tre pozitivan efikon.

I. L.

## «NOVAVENTA» KONFORMISMO

D-ro Artur Bormann en «Interlingvistika Informa Servo» (jan., feb., mar. 77) deklaras sub la titolo «Ne objektiva kritiko»: «*En la revuo 'Horizonto' estas ofte<sup>1</sup> polemikoj kontraŭ mi kaj kontraŭ la sinteno de UEA, kies ĝeneralan starpunkton mi taksas la sole eblan en la intereso de nia ideo. Diskutado kun la disidentoj ŝajnas senutila, do mi ne respondos, se ne specialaj cirkonstancoj devigos min.*»

Jen kio eĥas la Deklaro-n de la Estraro de UEA en la 12.04.76 (Esperanto, n.º 4/1976, p. 62): «*La Estraro ne deziras foruzi tempon je polemikado, ĉar ĝi okupiĝas pri pozitiva laboro por Esperanto kaj fidas je la kapablo de la membraro de UEA juĝi la veron interalie pri la oficialaj eldonaĵoj de UEA, pri kiuj la Estraro akceptas plenan respondecon<sup>2</sup>.*»

Kaj same en Heroldo (n.º 9-24 majo 77): «*Por ne tedi la legantojn<sup>3</sup>, ni publikigas nur parton de niaj komentoj pri tiu ĉi bedaŭrinda afero. Tiuj, kiuj interesiĝas pri nia kompleta starpunkto, povas mendi ĉe la redakcio de «Heroldo» la kompletan tekston de la artikolo, prefere aldonante internacian respondkuponon.*»

Ankaŭ en l'esperanto (2-3 feb., mar. 77) el la plumo de Renato Corsetti responde al kritikoj de Vittorio Dall'Acqua: «*La nivelo de la polemiko estas tia, kian mi ne volas eniri por respondi detale ĉiun eron<sup>4</sup>.*»

—oOOo—

Nu, kion signifas la vorto «polemiko», se ne laŭ PIV: «*Skriba publika diskutado?* Estas memkompreneble, ke polemiko supozigas la ekziston de «nekonformistoj». Kaj kion signifas la vorto «disidentoj», se ne laŭ PIV: «*Persono, kiu disiĝas de la oficiala religio de sia lando?*»

Sekve ĉiuj ĉi-supraj deklaroj evidentigas per si mem la altrudon de *oficiala doktrino*, kiu — eĉ se tion perfidas nur la subkonscio! — pro kvazaŭ sakrala, ideokratia<sup>5</sup> karaktero toleras eĉ ne la ombron de kritiko.

Ciu ja kapablos «*juĝi la veron pri la oficialaj eldonaĵoj de UEA*», nur kondiĉe ke plu estu libera diskutado inter plureco de opinioj; se ne, restas nur konformistoj kaj mankas demokrateco kaj progresemo. Nu, jen laŭ modelaj instrukcioj de la Estraro de UEA — kiuj instrukcioj ŝajne inspiroas de totalismaj reĝimoj kun unusola doktrino superreganta kiel religia dogmo — multaj «samideanoj» eĉ ne kuraĝas publike esprimi sian propran opinionon aŭ simple legi HORIZONTO-n! Kien do iras Esperantio? Ĉu al nova mezepoka skolastiko? Cetere, kiu silentas, konsentas!

J. T.

<sup>1</sup> Entute nur en la 1-a kaj 6-a numeroj de HORIZONTO d-ro Artur Bormann havis la honoron esti menciita: ĉu tiu «ofte» esprimas ian bedaŭron, ke la mencio fariĝis tro rara?

<sup>2</sup> Tiel! La Estraro de UEA do plene respondecas pri la nova koloro de la Asocio.

<sup>3</sup> Kaj tamen «*Sen libera kritiko ne estas flata laŭdo*» (P.A.C. de Beaumarchais). Lasi supozoj, ke ĉia diskuto povas nur «*tedi*» la esperantistan komunajon, estas sub la nivelo de liberaj homoj!

<sup>4</sup> La bela preteksto!

<sup>5</sup> Ideo-kratio — reĝimo, en kiu la politika povo dependas de nur unu ideologio.

# LA BATALO DE L'PAC-EMULOJ!

Jam de kelkaj jaroj — precize de post la TEJO-kontestado de 1970 — furiozas en Esperantio gazetara kampanjo kontraŭ Okcidentajn esperantistojn, kiuj kvazaŭ trafite de stranga masoŝismo apenaŭ reagas al la ricevitaj batoj.

—oOo—

De la ofensivo ŝprucis el Pollando la unua salvo, kiu fronte atakis la ĉefredaktoron de Plena Ilustrita Vortaro per argumentoj pli politikaj ol lingvaj: temis pri la difinoj rilataj al naziismo. Kiuj emis kredi al tiaj argumentoj sen kontrolo, povis pensi, ke la ĉefredaktoro (iama militkaptito de la naziistoj) subite intencis preskaŭ defendi ilin: neimagebla kritiko!

—oOo—

Poste el LITERATURA FOIRO sekvis disaj diskutoj kontraŭ la principon de la gramatika specifikado de la vortelementoj. La ĉefa difekto reciproita al tiu principo estas, ke ĝia argumentado estis sankciita de la Akademio mem post prezento de la nuna prezidanto. La atakoj, kies formoj kaj aranĝoj ŝajne celas subfosi la aŭtoritaton de la Akademio, venis de Hungario sub la subskribo de la lingvisto István Szerdahelyi kaj trovis cetera eĥan apogon en ESPERANTO EN SKOTLANDO (la bulteno de la federacio de William Auld).

—oOo—

Krome jam de kelka tempo multiĝas novaj akraj kritikoj sub la nomo de Karolo Piĉ en STARTO de Ĉeĥoslovakio.

La unuaj koncernis la sciencon terminologion sub la titolo «*La greka anatemo*». Kaj kiam oni legas en tiu gazeto sur la paĝo 11 de la numero 77-1, ke la artikolo ricevas «*gratulojn*» de Renato Corsetti, oni tuj komprenas, de kie blovas la vento. «*La ekzemploj pri la pluraj signifoj de grafo laŭ PIV*», skribas Renato Corsetti, *estas pli ol konvinka pruvo pri la minimume stranga pensmaniero de la redaktintoj. Cetera tiu aristokrata sinteno / ni kleruloj uzu klerajn vortojn el greka deveno / absolute kontraŭas la demokratian spiriton de la movado por la internacia lingvo*». Vere tiaj vortoj de Renato Corsetti «*estas pli ol konvinka pruvo*» pri lia intenco efektiviĝi politikajn instrukciojn. Sed kun kia celo? Ja oni rajtas demandi sin, ĉu tiaj instrukcioj ne strebas nei la ekziston de internacia scienca terminaro kun la kaŝpenso redukti la Lingvon Internacian je primitiva komprenilo.

Car en la sama numero oni denove eksturmas kontraŭ PIV. «*La tiel nomataj pseŭdoprefiksoj, pseŭdosufiksoj, pseŭdoprepozicioj kaj «internaciaj vorteroj» estas nur ruza konstruo, kies sola celo estas trudi al Esperanto tute novan, neregulan, tipe okcidentisman derivadsistemon, absolute fremdan al la Zamenhofa!*» Tiel por plej bone demonstri sian tezon la kritikanto eĉ pruntedonas al PIV intencion, kiun ĝi neniam havis. La cititaj ekzemploj estas inter aliaj: *pre — eŭ — des — retro — pseŭdo — anti — intra — tele*. Nu, kiel PIV prezentas ilin? Nur kiel «*internaciajn vorterojn*» destinitajn por prilumi la etimologian signifon de la scienca nomenklaturaro kaj tute ne kiel komunlingvajn elementojn: nenie en PIV estas troveblaj la formoj adjektivaj *pseŭda — retra — intra nek pseŭdoa — retroa*, kiujn pretendas citi STARTO. Kiel klarigis pri la medicina lingvo d-ro A. Albault (PIV, p. xxi), «*Ekz. al la formo «elektrokardiografio» aliaj aŭtoroj jam preferis «elektrokardiografio», formon kutiman en la tri ĉeflingvoj de medicino, angla, franca kaj germana; kiel tute, tiu lasta formo povus akiri civitraton en Esperanto dank'al la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko; sed estas pli ekonomie kaj racie fari plian paŝon kaj noti la radikon «kardi» kiel «grekan radikon»: ne uzebla sola, ĝi servas por formi multajn kunmetaĵojn, prefere kun aliaj grekaj radikoj, sed ne ekskluzive kun tiaj*». Tia averto estas tamen klara: *ne uzebla sola...* Tial ĉu necesas kredi, ke la kritikanto ne legis ĝin? Plue d-ro A. Albault eĉ precizigis sian penson: «*Zamenhof ja antaŭvidis, brave kaj prave, la epokon, kiam nia lingvo kapablus kontentigi same la bezonojn de la homoj sur la strato (kiuj suferas je dentodoloroj) kaj la postulojn de la sciencisto (kiu por kuraci siajn pacientojn studas la odontologiojn)*». Plie, jam de antaŭ 1935 ekzistas en la lingvo la vorteroj: *cis — iv* kaj *iz* kaj ilin malakcepti nun (!) tio estus retropaŝi, neante pli ol 35 jarojn da evoluo! Krome, estas eraro, se ne malsincereco, aserti, ke estas «*Infra / laŭ PIV: adverbo, kun -a !*», dum simpla kontrolo sur paĝo 428 montras: «*Infre / Malsupre. -a Malsupra: la -aj membroj*. Kaj jen ĉi tiun strangan atakon paradokse sekvas jena propono: «*Esperanto tuj povus adopti la Ido-sufikson -e, kiu havas la saman signifon kiel la esperanta, cetera longa, peza, priskriba kaj maloportuna -kolora: violea /violkolora/, rozea /rozkolora/, sablea /sablokolora/...*» Tiel! Ankoraŭ unu propono laŭ la fama modelo de d-ro J. Pool!

—oOo—

Nun ĉiu rajtas demandi sin, kion fine signifas tiaj senĉesaj kaj tro ofte malbonintencaj, se ne malsinceraj, kritikaĉoj kontraŭ la Okcidentan esperantistaron. Ĉu do temas pri la deziro fari el Esperanto nur privilegian monopolon de slavaj popoloj? Ja

tion oni povus kredi, kiam oni legas en HEROLDO 77-marto sub la plumo de T. J. Michalski tiel akran recenzojn pri la fama romano de Raymond Schwartz «Kiel akvo de l'rivero»: «La eldonejo represis nur la krudan, neredaktitan aŭtoran tekston kun multaj, nepre korektendaj, gramatikaj eraroj (precipe akuzativaj), galicismaj sintaksoj, idiomoj kaj vortuzoj pene aŭ mise kompreneblaj por la leganto ne lerninta la francan lingvon». Sendepende de la jura kaj morala demando, ĉu eldonejo rajtas iel ajn modifi jam presitan tekston sen konsento de la aŭtoro, kion konkludi? Ĉu vere R. Schwartz tiel malbone verkis, aŭ T. J. Michalski estas tiel senklara, ke li pene aŭ mise komprenas lin? Aŭ... ĉu nun nur la komunistoj kapablas ĝuste uzi Esperanton? Tion ŝajne lasas subkompreni la konverĝo de tia kampanja ofensivo fare de la tiel sin nomantaj «por-pacaj» homoj:

Jean Thierry

## LA INTERNACIECO DE ESPERANTO KAJ LA KARAKTERO DE LA HIND-EŬROPAJ ELEMENTOJ EN ĜI

*Prelego farita de Prof. Fabrizio A. Penacchiotti, Universitato de Venecio, en la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado.*

*Humblebæk, Danlando, Julio 1977.*

0. La problemo, ĉu Esperanto estas vere internacia, ne nur kiel institucio neŭtrala kaj ne-etna lingvo, libervole uzata de pluraj diversnaciaj en la tuta mondo, kiuj konsistigas ties sociologian bazon, sed ankaŭ laŭ lingvo-tipologia, pure teknika, vidpunkto, estis lastatempe objekto de multaj esploroj kaj diskutoj.

Oni povas distingi en tiu ĉi maniero pritrakti la internaciecon de Esperanto du diversajn tendencojn: 1) tiun de la asertantoj, ke Esperanto estas vere internacia pro la fakto, ke tipologie ĝi estas la plej hind-eŭropeca el la ne-hind-eŭropaj lingvoj; 2) la tendencojn de tiuj, kiuj asertas, ke Esperanto estas vere internacia, ĉar ĝi tipologie estas la plej ne-hind-eŭropeca el la hind-eŭropaj lingvoj. Oni povus reformuli la kontraston jene, ĉar la koncepto "hind-eŭropa lingvo" estas iomete tro vasta: ĝi implicas fakte ankaŭ lingvojn ne baziĝantajn sur la okcidenta kulturo, kiel la arajn idiomojn de Irano kaj Hindujo. Nu, estas unuflanke tiuj, kiuj opinias, ke Esperanto estas la plej okcident-kultura el inter la tipologie ne-hind-eŭropaj lingvoj, kaj aliflanke estas tiuj, kiuj inklinas aserti, ke Esperanto tipologie estas la plej ne-hind-eŭropa el la okcident-kulturaj lingvoj. Kiu el la du tendencoj estas la pli prava? Mi provos rapide ekzameni la plej signifohavajn argumentojn, sur kiuj apogiĝas la du diversaj tezoj.

1. La lingvistoj, kiuj konsideras la strukturon de Esperanto kiel esence ekster-eŭropan, povas citi favore al sia tezo prijuĝon, kiun la kreinto de la lingvo mem skribis en la Fundamenta Krestomatio: «Eŭropanoj kredas, ke ili parolas eŭropan lingvon, parolante Esperanton, sed efektive ĝi ha-

vas strukturon, kiu ne estas eŭropa, sed universala!»<sup>1</sup>. Laŭ Zamenhof, kiel ni vidas, Esperanto estas konstruita sur universalaj principoj kaj ne konsistigas imitaĵojn de eŭropaj modeloj. Kvazaŭ antaŭvidante akuzojn pri «eŭrocentrismo» tipajn de nia postkolonia epoko, Zamenhof akcentis la originalecon kaj tutmondecon de sia kreitaĵo. Sed kion signifas, ke la strukturo de Esperanto estas universala? Ĉu vere ĝi enhavas trajtojn, kiuj estas plejparte komunaj al ĉiuj lingvoj? Neniu lingvisto hodiaŭ akceptus senrezerve la aserton pri la lingva universaleco de Esperanto, ĉar oni scias, ke ĉiu lingvo obeas al aparta sistemo kaj ke sistemo por konservi sian internan koheron devas necese distingiĝi de aliaj lingvaj sistemoj. Alivorte dirite, ne ekzistas universala lingvosistemo; ekzistas male kelkaj lingvaj fenomenoj, kiuj manifestiĝas en preskaŭ ĉiuj lingvoj, sed konstrui sur ili novan universalan lingvon estus neeble. Oni devas ĉiuokaze elekti specialan lingvotipon. Lingvistoj tamen povas akcepti la opinion de Zamenhof, ke Esperanto obeas al sistemo pli proksima al tiuj de la ekster-eŭropaj lingvoj ol al la eŭropaj.

Tiun tezon koncerne la strukturon de Esperanto hodiaŭ ĉefe subtenas Prof. Alessandro Bausani, membro de la itala nacia akademio «Accademia dei Lincei», la svisa filologo Claude Piron kaj la jugoslava lingvisto Dalibor Brozović, kiuj esploris la objekton unu sendepende de la alia.

Komuna karakterizaĵo de la lingva analizo de tiuj ĉi sciencistoj estas la fakto, ke ili konsideras la tute eŭropan leksikon de Esperanto kiel surfacan kaj sekundaran aspekton de tiu lingvo kompare kun aliaj pli profundaj kaj kvalifikaj propraĵoj de Esperanto cele al tipologia difino.

1.1. Prof. Bausani ekzemple alvenis al la konkludo, ke, malgraŭ la kompleta eŭropeco de ĝia vortaro, Esperanto prezentas «formalan strukturon de tipo *aglutina*, sed havantan, plue, la eblecon (realigeblan en lingvoj de tipo *izola*) apartigi kaj forpreni la unuopajn afiksojn, igante ilin uzeblaj ankaŭ kiel sendependaj vortoj»<sup>2</sup>.

Esperanto do, dank' al la nevariebleco de ĝiaj radikoj kaj afiksoj, similas unuflanke al la uralo-altajaj lingvoj (aglutinaj) kaj, dank' al la ebla sendependa vivo de ĝiaj afiksoj, proksimiĝas aliflanke al la izolaj lingvoj kiel la ĉina kaj la vjetnama.

1.2. Al la sama konkludo alvenis Claude Piron, kiam li substrekis, ke Esperanto estas, kiel la ĉina (izola lingvo) ekskluzive komponita per nevarieblaj monemoj (/morfemoj) inter si senfine kombiniĝantaj, kaj ke ĝi, kiel la japana lingvo (aglutina lingvo), eksplacitigas la gramatikan rolon de ĉiu frazelemento per partikuloj kaj finaĵoj. Krome, Claude Piron atentigis, ke diference de tiuj du ekstremorientaj lingvoj, Esperanto prezentas la avantaĝon posedi vortordon same liberan kiel tiu de la rusa aŭ de la latina<sup>3</sup>.

1.3. Pravigon de la tezoj de Prof. Bausani kaj Claude Piron alportis la rezultoj, cifere esprimitaj, de la tipologiaj komparoj ellaboritaj de D-ro Brozoviĉ, unue surbaze de la metodo pri kvantigita tipologia klasifiko de la soveta lingvisto Ju. V. Rojdestvenski, due surbaze de la diverspremisa klasifik-sistemo de la usona lingvo-tipologiisto J. H. Greenberg<sup>4</sup>.

Analizinte Esperanton laŭ 19 kriterioj concernantaj sonojn, silabojn, morfemojn, vortojn, procedojn de vortfarado, sintagmajn kaj sintaksajn rilatojn, kaj komparinte Esperanton kun ses diersaj lingvogrupoj, D-ro Brozoviĉ atingis kvantajn indikilojn, kiuj pruvas la *aglutinan* karakteron de Esperanto kaj ĝian apartan tipologian similecon al la turkaj (uralo-altajaj) lingvoj. Pli precize, la Internacia Lingvo sur tiuj ciferaĵoj tabeloj aperas lokigita inter la turka kaj la hind-eŭropa lingvogrupoj, pli proksima tamen al la unua ol al la dua; kaj ĉar la turka lingvotipo prezentas mezvaloran karakteron inter la ekstremaj lingvotipoj reprezentataj de la semidaj lingvoj unuflanke kaj de la ĉina aliflanke, sekvas ke Esperanto montras tipologian karakteron sufiĉe mezvaloran, ne tro fremdan rilate la strukturon de ĉiu alia lingvo.

La kompara esploro farita de D-ro Brozoviĉ laŭ la metodo de Greenberg kondukis al rezultoj, kiuj bone harmonias kun la ĵus menciitaj. Cifoj Esperanto estis analizita laŭ 10 krite-

rioj (ekz. oni kalkulis surbaze de centvorta teksto la nombron de radikaj morfemoj, prefiksoj, sufiksoj k.t.p.) kaj oni komparis la koncernaj kvantaj indikilojn kun la respondaj de 16 lingvoj el 8 diversaj lingvogrupoj. Denove evidentiĝis, ke Esperanto kundividas kun la turkaj lingvoj la difinon de lingvo apartenanta al «mezvalora, al ĉiuj proksima lingva tipo»<sup>5</sup>.

2. Nun alvenis la momento por demandi, kiamaniere ni devas taksu tiun mezan valoron lingvotipologie mezuritan de Esperanto. Ĉu ĝi sufiĉas por garantii la internaciecon de la lingvo? Mi opinias, ke ne. Ĝia internacieco estas certigita nur de ĝia tute eŭropa leksiko, ĉar kiel agnoskas Prof. Bausani «nun multegaj eŭropaj vortoj estas uzataj en praktike ĉiuj lingvoj de la mondo».

Mi kredas, ke la supremenciita mezvaloreco de Esperanto garantias kaj klarigas kontraŭe la relative pli facilan lerneblecon de ĝi por homoj kun la plej diversaj lingvokutimoj dise tra la mondo. Esperanto kombinas fakte la avantaĝojn de lingvoj karakterizataj de simplega morfologio kaj tirana vortordo (vidu la ĉinan kaj la malajan) kun la avantaĝoj de lingvoj kun ege komplika morfologio sed liberegaj frazkonstruoj (vidu la latinan, la malnovgrekan kaj la rusan).

Ĉu fine la simileco de la strukturo de Esperanto al tiu de la turkaj lingvoj, simileco pruvida rilate al tre limigita nombro da kriterioj, sufiĉas por difini la Internacian Lingvon strukture ne-hind-eŭropa, dum nur «en unu specifa etimologia senco oni povas ĝin tamen konsideri hind-eŭropa»<sup>6</sup>?

Mi havas la impreson, ke la interesaj kaj stimulaĵoj rimarkoj de Prof. Bausani kaj Claude Piron kaj la matematika esprimitaj tipologiaj indikiloj de D-ro Brozoviĉ, malgraŭ ĉio preteratentis la aŭtentikan fizionomion de Esperanto. Estas kiel se oni difinus la Papuojn de Nov-Gvineo kiel afrikajn negrojn nur pro la fakto, ke ilia haŭto estas same nigra. La aglutineco de Esperanto estas certe gravega kaj distinga trajto de ĝia strukturo, ĝuste kiel la nigra haŭto estas tio por la Papuoj; tamen ĝi restas kvalito tute memstara, kiu ne integriĝas en la komplekson da sintaksaj fenomenoj, kiuj kutime karakterizas ĝisfunde aglutinan lingvon, mi citu nur la posedon de postpozicioj anstataŭ prepozicioj, la mankon de genro, la mankon de rilativaj pronomoj k.t.p. Same, la negroidoj de Nov-Gvineo, krom ilia nigrhaŭteco, havas nenium el la rasaj karakteroj de la afrikaj negroidoj.

Pro tio mi kredas, ke ne havas sencon difini la strukturon de Esperanto nur surbaze de la pli-malpli grandaj si-

milecoj, kiujn ĝi prezentas kun opaj lingvoj de la mondo. Se Esperanto havas sian propran klare tranĉitan kaj distingitan fizionomion, tiu ĉi estas analizebla kaj malmuntebla en pure eŭropajn komponantojn, kaj tiuj ĉi komponantoj, kiel ni vidos, ne retroviĝas ĝenerale en ĉiuj lingvoj de Eŭropo, latinidaj ĝermanaj slavaj baltaj keltaj k.t.p., sed nur, kaj ne hazarde, en la apartaj lingvoj de centrorienta Eŭropo, kiuj formis la denaskan lingvomedio de Zamenhof. Dank' al ilia origina homogeneco kaj profunda kongruenco kun la lingvokutimoj de certa regiono, ne estis malfacile por Zamenhof sintezigi tiujn komponantojn en harmonia nova strukturo.

2.1. Ke la strukturo de Esperanto, aparte de tiuj aspektoj, kiuj estas fremdaj al la eŭropaj kaj ĝenerale hind-eŭropaj lingvoj (kiel la nevariebleco de la radikoj kaj afiksoj, la konstanta ĉeesto de vortfinaĵoj por faciligi la gramatikan analizon de la frazo kaj la ebla memstareco de la afiksoj), estas intime ligita al la eŭropaj lingvomodeloj, kiujn Zamenhof plej bone konis, demonstris Prof. Szerdahelyi priiraktante la semantikan sistemon de Esperanto. Li asertis interalie, ke la de Zamenhof «lingvokono kaj lingva pensmaniero jam antaŭdestinis la karakteron de la nova lingvo»<sup>7</sup>, kaj ke, se oni serĉas la lingvajn «fontojn» de Esperanto, oni devas ilin serĉi nur en la gamo de la lingvoj, kiujn li flue parolis (jido/judgermana, rusa, pola, germana) aŭ kiujn li studis en lernejo (franca, latina, angla, greka, hebrea, aramea): «ĉiuj aliaj koincidoj estas hazardaj»<sup>8</sup>.

Mi aldonus, ke en la modlado de la lingvokutimoj de Zamenhof la plej gravan rolon ludis lia patrina lingvo, la jido, pri kies normigo li serioze okupiĝis inter la jaroj 1876 kaj 1879<sup>9</sup>. Mi estas konvinkita, ke la varpo mem de tiu supra kaj multfadena teksaĵo, kiu estas Esperanto, estas esence la fonetika kaj gramatika substanco de tiu lingvo, en kiu germanaj kaj slavaj lingvoformoj tiel glate interkombiniĝas.

3. En tiu perspektivo mi intencas nun menciigi kelkajn el la plej tipaj karakterizaĵoj de Esperanto, kiuj estas klarigeblaj nur per la specifaj centrorient-eŭropaj, german-slavaj lingvokutimoj de Zamenhof.

## FONOLOGIO

La sonsistemo de Esperanto respegulas tre fidele la sonsistemojn de la germana, de la pola, de la rusa kaj precipe de jido en Pollando kaj Orient-eŭropo. Ne hazarde ĝi respondas preskaŭ perfekte al la

sonsistemo de la nov-hebrea lingvo, sur kiun grandan influon havis la fonetikaj kutimoj de la centr-kaj orienteŭropaj Judoj enmigrintaj en Israelon. Kiel jido, la slavaj, la baltaj kaj la novhebrea lingvoj, Esperanto ignoras la vokalojn Ŭ kaj Ő. Kiel ĉiuj tiuj lingvoj kaj la germana, kaj kontraste kun la latinidaj lingvoj kaj la angla, Esperanto ne posedas la labiovelarajn kombinaĵojn KŬ- kaj GŬ-: oni diras *kvalito*, ne *kŭalito*; *gvidi*, ne *gŭidi*. Inter la hind-eŭropaj lingvoj de Eŭropo Esperanto kundividus ekskluzive kun la germana, jido kaj la baltaj kaj slavaj lingvoj la jenajn konsonantgrupojn interne de la sama radikoj: PC (subskripcio), SC (disciplino), SK (ŝkopo), SL (ŝlimo), SM (ŝmiri), SN (ŝnuro), SP (ŝparo), SPR (ŝpruci), SR (ŝraŭbo), ST (ŝtalo), SV (ŝvebi).

## VORTKUNMETO

Esperanto, kontraste kun la latinidaj lingvoj, havas la eblecon konstrui vortojn kunmetante radikojn. Tiu ĉi procedo troviĝas en pluraj hind-eŭropaj kaj ne hind-eŭropaj lingvoj, inter la unuaj en la greka, en la persa, en sanskrito kaj prakritoj, en la ĝermanaj kaj en la slavaj lingvoj. Esperanto tamen ne toleras ordinare pli ol duelementan kunmetaĵon se la radikoj estas verbaj, adjektivaj aŭ substantivaj, permesante al si kontraŭe la akumulon de pluraj afiksoj. En tio Esperanto enkadrigas tipologie en la vicon de la moderaj vortkunmetaj lingvoj, kiel *jido* kaj la slavaj kaj kontrastas kun la germana.

La sintaksa strategio de vortkunmetaĵo estas tamen tiel fundamenta en Esperanto ke ĝi influas sur aliajn sektorojn de la lingvo. Ekzemple, al la prepozicia sistemo de Esperanto tute mankas tiuj subtilaj, abstraktaj, plurfunkciaj elementoj, per kiuj la latinidaj lingvoj esprimas la rilatojn alilingve esprimatajn per vortkunmetaĵoj. Vidu ekzemple la vortojn *velboato* kaj *ĉashundo* kiuj france, itale kaj hispane esprimiĝas per tio, kio vortvorte respondas en nekorekta Esperanto al *boato al/je/de velo(j)* [bateau à voiles, barca a vela, bote de vela] kaj *hundo de ĉaso* [chien de chasse, cane da caccia, perro de caza].

## PREPOZICIOJ

Kompense la Esperanta prepozicia sistemo, celante interkomunikan klarecon kaj por eviti eblajn miskomprenojn, estas rimarkinde pli riĉa kaj detala ol la latinidaj prepozicisistemoj. Dum ĉi-lastaj, escepte de la hispana, rezultas el drasta simpligo kaj renovigo de la arkaikaj kompleksa inventaro de la latinaj prepozicioj, Esperanto prezentas sistemon tre proksiman al tiu de tipe konservemaj lingvoj kiel la germana kaj la baltoslavaj.

Ordinare la regulo estas, ke ju pli alta estas la nombro de la prepozicioj de unu lingvo, des pli konkreta kaj preciza estas la funkcio de ĉiu unuopa prepozicio. Nu,

koncerne la nombron de la prepozicioj estas granda analogio inter Esperanto, la germana kaj la baltoslavaj lingvoj; same koncerne la tipon de la opozicioj, kiuj garantias al ĉiu prepozicio ĝian apartan funkcion. Male, la Esperanta neprozici-sistemo kaj kvante kaj kvalite diverĝas de la latinidaj. Ni faru nur kvar ekzemplajn:

1) Ĉiu antikva aŭ konservema lingvo de Eŭropo posedas specialan prepozicion por esprimi la maleston de io, nome la greka *áneu*, la latina *sine*, la malnovirlan-da *cen*, la gota *inuh*, la germana *ohne*, la rusa *bez'*, la letona *bez* kaj Esperanto *sen*. Kontraŭe, ĉiu renoviĝinta eŭropa lingvo faligis el sia inventaro la respon-dan prepozicion, anstataŭigante ĝin aŭ per vorto signifinta ĝuste «maleston», vidu la italan *senza* kaj la francan *sans* el latino *absentia*; aŭ per novaj kunmeta-ĵoj, vidu la anglan *without* kaj la svedan *utan*.

2) Kaj la germana, kaj la baltoslavaj lingvoj, samkiel la latina, la greka, la gota, la malnovirlanda k.t.p., konservas specialan prepozicion por esprimi la de-venon de la interno de io, al kiu respon-das en Esperanto la prepozicio *el*; vidu ger. *aus*, rus. *iz'*, let. *iz*, lat. *ex*, grek. *ek*, got. *us*, irl. *ess*. Male, en la latinidaj ling-voj komparebla prepozicio ne plu ekzis-tas kaj oni esprimas tiun rilaton divers-maniere, ekzemple la frazon *el 20 ŝafoj 3 perdiĝis* en la itala oni esprimas vort-vorte *3 ŝafoj sur 20 perdiĝis*. La rilato es-tas tute renversita.

3) Alia fundamenta propraĵo de Espe-ranto, kiu estas komuna nur al la germa-na kaj al la baltoslavaj lingvoj, krom la antikvaj kiel la latina kaj la greka, estas la «almova akuzativo», kiu sekvas certajn prepoziciojn; ekzemple komparu la fra-zon *meti libron sur tablon* kun la frazo *vidi libron sur tablo*. Tiu ĉi tipo de aku-zativo, kiu ludas gravegan, eĉ pivotan ro-lon en Esperanto kaj en la supre men-ciitaj lingvoj, tute mankas al la latinidaj lingvoj, ĉar ili ne plu konas deklinacion, kaj same malestas en tiuj ĝermanaj ling-voj, kiuj perdis la akuzativan kazon.

4) Rilata la objektan akuzativon, kiu estas alia vortfunkcio konservata, inter la hind-eŭropaj lingvoj nuntempaj de Eŭropo, nur de la germana, la balto-slavaj, la novgreka kaj de Esperanto, mi rimarkas, ke en la Internacia Lingvo oni diras *ludi kartojn*, *ludi ŝakojn* k.t.p. ĝuste kiel en la germana *Karten spielen*, *Schach spielen* k.t.p. La latinidaj lingvoj en tiu ĉi kazo ne konkretigas la agon per nedifinita objekto, sed prezentas ĝin abs-trakte, substrekante ĝian modalecon, ek-zemple *jouer aux cartes*, *aux échecs*; *giocare alle carte*, *agli scacchi*; *jugar a los naipes* k.t.p. La angla, kiel kutime,

troviĝas mezvoje, povante diri ĉu *to play cards*, *chess*, ĉu *to play at cards*, *at chess*. La rusa fine prezentas la agon konkrete kiel Esperanto kaj la germana, sed ne per objekto (la rusa lingvo ne povas mor-fologie distingi difinitecon disde nedifi-niteco krom en kelkaj kazoj), sed per iaspeca lokativo: *igrat' v karty*, *igrat' v ŝaxmaty*, laŭvorte «ludi en kartojn, en ŝakojn».

## VERBO

Trajto, kiu denove rilatigas Esperanton kun konservemaj hind-eŭropaj lingvoj es-tas ĝia dispono pri vasta gamo da parti-cipioj aktivaj kaj pasivaj. Tio ne nur me-morigas la latinan, grekan kaj sanskritan verb sistemojn, sed trovas analogion ĝuste en la slavaj kaj en la baltaj lingvoj.

Estas interese, ke dank' al tiuj partici-poj Esperanto evitas la uzon de *havi* kiel helpverbo kaj formas la kompleksajn tempojn (perfekto, imperfekto kaj pre-dikto) simple per la verbo *esti* akompa-nata de aktivaj aŭ pasivaj participoj por prezenco, preterito kaj futuro. Esperanto do kontrastas kun la latinidaj kaj la ĝer-manaj lingvoj, kiuj utiligas en tiuj ĉi kazoj la helpverbon *havi*, kaj male ĝi en- vicigiĝas inter la baltoslavajn lingvojn, ĉe kiuj la helpverbo *esti* estas diversgrade uzata. Plena analogio troviĝas inter Espe-ranto kaj la baltaj lingvoj, almenaŭ en la formoj entenantaj preteritan partici-pion, ekzemple *mi estas/estis/estos aku-zi(n)ta*.

Alia trajto, kiu kunligas Esperanton kun la baltaj lingvoj kontraŭ ĉiu alia hind-eŭropa lingvo estas la fakto, ke ĝi posedas nur tri simplajn tempojn (pre-zenco, preterito kaj futuro). Kompare kun tiu triangula temposistemo, tiuj de la latinidaj kaj keltaj lingvoj estas multe pli konservemaj kaj kompleksaj, dum la ĝermanaj kaj slavaj temposistemoj estas ankoraŭ pli simpligitaj.

## PRONOMOJ

Esperanto distingas inter tri genraj for-moj de la triapersona pronomo singula-ra: vira *li*, ina *ŝi* kaj neŭtra *ĝi*. Adoptan-te tiun diferencigon, kiu karakterizas kaj la antikvajn kaj la plej konservemajn nuntempajn hind-eŭropajn lingvojn, Espe-ranto aŭtomate lokiĝas flanke de la ĝermanaj kaj slavaj lingvoj, kontrastante kun la latinidaj, kiuj forlasis la neŭtron.

Ekskluzive hind-eŭropa kaj adoptata nur de la lingvoj, kiuj havis longajn kontaktojn kun la hind-eŭropa medio, ekz. la finna kaj la hungara, estas la sintaksa strategio, per kiu Esperanto konstruas la rilativajn frazojn. Ĝiaj rilatpronomoj fakte, krom enkonduki subordinigitan pro-nozicion, servas ankaŭ por ludi la rolon de ties subjekto, objekto aŭ komplemen-to. Inter la eŭropaj lingvoj (ni ne inkludu la vaskan) nur *jido* sekvas alian stra-tegion, ĉar ĝia rilatpronomo ofte bezonas

la akompanion de personpronomo, evidente por la semida influo de la hebrea kaj de la judaramea, tiel ke frazo kiel *la amikoj, al kiuj li skribis* esprimiĝas laŭvorte la *amikoj, kiu li skribis al ili*.

Estas por rimarki, ke Esperanto formas la rilatpronomojn per la sama radiko de la demandpronomoj, ĝuste kiel *jido*, la baltoslavaj kaj la latinidaj lingvoj, dum la ĝermanaj lingvoj ordinare uzas demonstrativan radikon aŭ senŝanĝan partikulon.

## ADJEKTIVOJ

La Esperanta adjektivo akordiĝas morfologie kun la koncerna substantivo rilate la nombron kaj la kazon. Tia akordo okazas ankaŭ en la latinidaj lingvoj (rilate la nombron kaj genron), en la germana (rilate nombron kaj kazon, sed ne en predikativa funkcio) kaj en la baltoslavaj (rilate nombron, genron kaj kazon). Malgraŭ tiu ĉi simileco, la adjektivo de Esperanto estas tipologie pli proksima al la baltoslavaj adjektivoj ol al la ceteraj. La frekvenco de ĝia utiligo skribe kaj parole atingas fakte valorojn kompareblajn nur kun la valoroj de la baltoslavaj lingvoj, kiuj samkiel Esperanto preferas esprimi per adjektivo tion, kion la latinidaj lingvoj, unuflanke, esprimas per prepozicia sintagmo, kaj la germana, *aliflanke*, per kunmetita vorto. La Esperanta kaj baltoslava tendenco povas esti reprezentata de la esprimo *junulara gastejo*, la latinida de *gastejo de la junularo* kaj fine la germana de *junulargastejo*.

Same, Esperanto aplombe uzas, kiel la baltoslavaj lingvoj, adjektivojn devenantajn de prepoziciaj sintagmoj, ekzemple *la postmilita situacio*; dum en la franca oni renkontas analizajn formulojn kiel *la situation de l'après-guerre (la situacio de la post-milito)* kaj en la germana aperas nur unu sinteza vorto: *die Nachkriegslage (la postmilita situacio)*. Pri la modera vortkunmetado de Esperanto mi jam parolis. En ĉiu okazo oni rimarkas, ke la Internacia Lingvo inklinas sekvi la mezan voion, kie sintezo ekvilibras kun analizo, kaj tion ĝi faras ekspluatante siajn unikajn rimedojn de forma klareco.

Resume kaj konklude, rapida trarigardo tra la morfo-sintaksaj aspektoj de Esperanto sufiĉas por montri, ke la Internacia Lingvo estas tipologie orientita en precizan direkton. Ĝi prezentas solvojn, kiuj estas plejparte karakterizaj de determinita grupo de hind-eŭropaj lingvoj, kiuj tamen estas malmulte reprezentataj en ĝia vortrezoro. Ne hazarde ili estas la germana, la pola, la rusa kaj la litova, ĝuste la lingvoj parolataj en la urbo Białystok, kie la aŭtoro de Esperanto naskiĝis, kreskis, lernis kaj kie li unue konceptis kaj nutris la ideon pri internacia lingvo.

Tiu varia, stimula kaj konflikta lingvo-

grundo neeviteble modlis la lingvajn kutimojn de la juna Zamenhof ek de lia infanaĝo, influante lian manieron pensi kaj analizi la realon. Poste tiuj lingvoj fariĝis la plej natura kaj senpera modelo, de kiu Zamenhof pli-malpli konscie inspiriĝis en la prilaborado de sia lingvoprojekto.

La struktura kunfandiĝo de la germana kaj de la baltoslava lingvomondo, kiun Esperanto rivelas en sia intimo, retroiras tre verŝajne al la patrina lingvo de la Aŭtoro, nome al tiu *jido*, en kiu tiel spontane germana formo kuniĝas kun slava spirito. Al tiu lingvo Esperanto ŝuldas, laŭ mia opinio, kaj sian senĝene facilan vortordon, kiu estas tiel slaveca, kaj sian rigoran konkretecon (interalie ĝi posedas difinartikolon), kiu estas tiel germaneca.

Esperanto estas do planlingvo, kiu baziĝas sur tipe mezeŭropaj lingvomodeloj, aplikitaj al leksika materialo ĉefe sudeŭropa pere de tute originalaj, vere geniaj, rimedoj de simpligo kaj reguligo. Tiuj ĉi lastaj faktoroj faras el ĝi internacian lingvon malfermitan al la tuta mondo.

Por reveni al la komencaj vortoj, oni povas diri, ke ĝia aglutina karaktero, harmonie enkadrigita en ĝia tipe mezeŭropa strukturo, faras el Esperanto la plej «ne-hind-eŭropan» el la okcidentkulturaj lingvoj.

## NOTOJ:

<sup>1</sup> L. L. ZAMENHOF, *Fundamenta Krestomatio*, pĝ. 248-249.

<sup>2</sup> A. BAUSANI, *Historia panoramo de interlingvistiko kaj lingvistika valoro de Esperanto*, prelego verkita en 1971 kaj prezentita okaze de la fermo-ceremonio de Esperanto-kurso ĉe la Filologia Rondo en Milano, esperantigita de Tazio Carlevaro kaj publikigita en la *Monata Cirkulero de la Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando*, numeroj 82-85 (1977). Citajo el n.º 85.

<sup>3</sup> C. PIRON, *Letero al Etiemble, profesoro pri kompara literaturo ĉe Sorbono, la 4-an de oktobro 1976*, publikigita en la cirkulero n.º 17 de *L'Esperanto a l'école*, 2610 Mont-Soleil, Svislando.

<sup>4</sup> D. BROZOVIC, *Pri pozicio de Esperanto en lingva tipologio*, en *Internacia Lingvistika Simpozio «Esperanto kiel lingvistika bazo de universala gramatiko kaj de metalingvo kaj kiel universala lingva fenomeno»*, Kumrovec, 1975 (Jugoslavio), Zagreb, 1976, pĝ. 33-81.

<sup>5</sup> D. BROZOVIC, *sama artikolo*, pĝ. 67.

<sup>6</sup> D. BROZOVIC, *sama artikolo*, pĝ. 56.

<sup>7</sup> I. SZERDAHELYI, *La semantika modelo de Esperanto, en Internacia Lingvistika Simpozio*, Zagreb, 1976, pĝ. 85-148; citajo el pĝ. 94.

<sup>8</sup> I. SZERDAHELYI, *La esperanta morfemaro*, en *Esperantologiaj Kajeroj 1.*, Budapeŝto, 1976, pĝ. 65.

Laŭ Szerdahelyi (*La esperanta morfemaro*, pĝ. 72) «ŝajnas, ke la okupiĝo pri la jida lingvo estis ia antaŭstudo al la posta E-o».

## INTERNACIA JURA REVUO

Ni jam plurfoje informis, ke tiu ĉi 48-paĝa periodaĵo (plus kovriloj) aperas du fojojn jare. N-ro 1/1977 enhavas artikolon de kand. jur. T. A. Høeg pri «La Leĝfarado de Magnus Lagabøter». Ĝi estas rimarkinda kontribuo al jurhistorio kaj jurisprudenco. La artikolo de D-ro K. Perko «Leĝdonaj kaj Administraciaj Kompetentecoj pri Lernejoj Aferoj en la Respubliko Aŭstrujo» estas pli vasta ol la titolo indikas, ĉar en ĝi estas pritraktitaj gravaj konstituciaj demandoj de unu el la multaj variantoj de kompetentecoj en federacie organizitaj ŝtatoj. La artikolo de la ĉefredaktoro, Prof. D-ro I. Lapenna, «Jura valoro de la Fina Akto de Helsinki» apartenas al la sfero de internacia juro kaj internaciaj rilatoj. Ĝi estas aparte aktuala pro la Konferenco de Beograd, kiu pritraktas la sekvojn de la Fina Akto. Nombro da artikoloj kaj kontribuoj de Sir Irvine Goulding (Anglio), Genĉo Genĉev (Bulgario) kaj Erik Gadd (Finnlando) rilatas al la rajto havi domon laŭ la leĝoj de diversaj landoj. Kune kun la artikoloj pri la sama temo, aperintaj en la antaŭa numero, ili prezentas abundan kaj valoran materialon. La rubrikoj *Notoj*, *Recenzo* kaj *Informilo* de IEAJ kompletigas tiun ĉi elstare interesan numeron.

En pasinta decembro aperis n-ro 2/77 de tiu ĉi, organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Ankaŭ tiu ĉi kajero estas 48-paĝa kun fortikaj kovriloj. En ĝi troviĝas ses ampleksaj artikoloj rilatantaj al jurisprudenco, jura historio, internacia juro kaj kompara juro. La artikolo de Prof. D-ro Ilmar Tammelo (Universitato de Salzburg) pritraktas vere gravan jurfilozofian temon pri la respondeco de la nuna homaro al la estontaj generacioj. La artikolo de Prof. D-ro I. Lapenna (Universitato de Londono) pri kelkaj juraj aspektoj de multlingveco en la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo tuŝas aktualan problemon, kiu fariĝas ĉiam pli komplika. La artikolo ankaŭ iom helpas al pli bona kompreno de la proponita Agadprogramo por la solvo de la lingva problemo en Eŭropo, publikigita en n-ro 6/77 de *Horizonto*. D-ro K. Perko donas plian interesan analizon de dividita jurisdikcio en federacia ŝtato. Aparte grava el teoria kaj praktika vidpunktoj estas la artikolaraporto de D-ro Antonio de Salvo, nuna redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio-Romo, pri dulingvisma demando laŭ la itala Konstitucio, en ligo ankaŭ kun la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La mallongaj artikoloj de D-ro Perko s-ro Duthilleul, D-ro Röhl, D-ro Mátéffy kaj D-ro Stoppoloni sub la ĝenerala titolo «La Rajto Havi Domon laŭ la Juroj de Diversaj Landoj» kompletigas la kontribuojn pri la sama temo en n-ro 1/77 de IJR. Aliflanke, la kontribuoj de s-ro Klingenberg, juĝisto Gadd kaj kand. jur. Høeg pri la juraj kvalifikoj por praktiki la juristan profesion kaj pri profesiaj juristaj organizaĵoj — ĉiuj sub ĝenerala komuna titolo — apartenas, same kiel la kolekto de kontribuoj pri la rajto havi domon, unuavice al la sfero de kompara juro. Fine, sed certe ne malplej grave, troviĝas Esperantlingva traduko de artikolo de D-ro Boman pri la juraj problemoj pritraktitaj de Jesuo. Ĝi certe interesos ne nur juristojn, sed ankaŭ specialistojn pri religiaj demandoj. Pliaj interesajoj, ekzemple pri la nova Soveta Konstitucio kaj pri la Nobel Pacpremio donita al Amnestio Internacia, troviĝas en la *Notoj*, *Recezoj* kaj *Informilo* de IEAJ.

IJR estas sendube la plej elstara nuntempa faka periodaĵo, regule publikigata en la Internacia Lingvo. Ĝi estas interesa ne nur por juristoj, sed ankaŭ por ĉiuj kleraj personoj, interesigantaj pri aktualaj demandoj ligitaj al jura reguligo.

La jara kotizo por ĉiuj kategorioj de membroj de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) estas 120 aŭstriaĵ ŝilingoj. La kotizo inkluzivas la abonon al IJR. Por nemembroj la abono al IJR estas, same tiel, 120 aŭstriaĵ ŝilingoj. La kotizojn, abonojn kaj kontribuojn (donacojn) por la Fondaĵo IJR bv. sendi al la sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz. Aŭstrio, poŝta ĉekkonto n-ro 1257.845.

ABONO AL «HORIZONTO»

Jen nia unua numero por la jaro 1978-a. Nia deziro estis kaj restas ke la revuo estu plaĉa al vi. Vian jarkotizon por 1978, vi povas pagi rekte al la Administracio (500 pesetoj) aŭ al niaj perantoj laŭ la listo, kiu aperas en la revuo.

Malgraŭ la devaluto de la peseto kaj pro la alta plialtiĝo de la kostoj en Hispanujo, mi petas ke vi ĉiuj pagu favore al la revuo, saman ĝisnunan kotizon en via respektiva valuto.

Kiu sendos per banko ia ajn pagon al la Administracio de «Horizonto», bv. aldoni 100 pesetojn por kovri la banko-kostojn. Dankon!!

Inés Gastón

## DEKLARO DE LA PREZIDINTO DE LA 3-a INTERNACIA KONFERENCO DE N.E.M.

En artikoleto pri la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado la sarlanda *Dialogo* skribis i.a.: «El informitaj rondoj ni eksciis, ke konata franca esperantisto sub protesto forlasis kunsidon pro la agresemo de Lapenna kiu daŭrigas sian detruan laboron. La resto de tiu reakcia grupeteto ĉirkaŭ Lapenna intencas kunveni en 1978 en Jaca (hispanaj Pireneoj)».

Ĉu laŭ *Dialogo*, ĉu rekte laŭ ties «informitaj rondoj», poste en Ĉeĥoslovakio prezidanto Vitek kaj sekretario Křimský de la tiulanda Esperanto-asocio prezentis en cirkulero similajn informojn pri la konferenco, same parolante pri «reakcio», «agresemo», «kvereloj» kaj pri franca konferencano, kiu «forlasis» la konferencan.

Ĉiuj partoprenintoj de la konferenco en Humlebæk scias, ke tiuj informoj estas absolute malkorektaj, sed por la personoj, kiuj ne ĉeestis, mi sentas min devigita deklari, ke la tuta konferenco evoluis en plej harmonia agordo. La diskutoj inter la partoprenantoj, ege interesitaj pri la temoj, estis ja tre viglaj, sed ankaŭ sur tre alta akademia nivelo, kaj helpis al pli bona kompreno de la nuna bedaŭrinda stato, kaŭzita de la hamburgaj eventoj. Neniu franco, nek iu ajn alia konferencano «sub protesto forlasis la kunsidon». Tute male, ni aŭdis nur esprimojn de kontenteco pri la konferenco kaj pri la plena libereco, kiu ebligis al ĉiu esprimi sian opinion.

Estas malagrabla konstati, ke de certaj flankoj oni daŭrigas la dissemadon de malveroj pri la Neŭtrala Esperanto-Movado, sed aliflanke ni ne tro ĉagreniĝu pro tio. Tiu agado kune kun la rifuzoj diskuti objektivite la problemojn, pri kiuj atentigas NEM, ja klare demonstras, ke al la kontraŭuloj de NEM mankas konvinkaj argumentoj. Nur per la fabrikado de senbazaj onidiroj ili havas esperon povi varbi nepripensemajn homojn.

*H. V. Rasmussen*

Prez. de la 3-a Internacia Konferenco  
de la Neŭtrala Esperanto-Movado

**Noto de la redakcio:** Antaŭ la finkompostigo de tiu ĉi n-ro la redakcio sciigis, ke *Dialogo* skribis la 7-an de novembro al S-ro R. Bernard, sekretario de la Akademio de Esperanto, ke «laŭ informo donita» S-ro R. Bernard «devus esti la konata franca esperantisto». Laŭ la sama «informo» — la letero daŭrigas — «Lapenna atakis kaj vin kaj amikon Waringhien kaj vi protestis kaj forlasis la konferencan». *Dialogo* plu skribis: «Nur se vi kontestus tion, mi ev. publikigos 'reĝustigon': sed mi ne kredas, ke mia informinto misinformis min».

La 11-an de novembro S-ro R. Bernard koncize respondis:

«Mi firme kaj solene deklaras, ke (1) Prof. Lapenna NE atakis min kaj Prof. Waringhien; (2) mi NE forlasis proteste ian ajn kunsidon dum tiu konferenco.»

Dubante, ke kie ajn «eventuale» aperos kia ajn «reĝustigo», *Horizonto* publikigas la supran Deklaron de S-ro H. V. Rasmussen kun tiu ĉi redakcia noto ne tial, ĉar ĝi atribuas kian ajn gravecon al la monologa t.n. *Dialogo* aŭ al speciala cirkulero de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, devige legita en ĉiuj sekcioj de tiu parti-politika instanco apartenanta al UEA, sed nur kiel tipan specimenon de la plej vulgaraj inventaĵoj kaj klaĉaĵoj, kiujn difinitaj rondoj plu cirkuligas en la Esperanto-Movado kaj al kiuj multaj esperantistoj — eĉ intelekto honestaj, sed iom tro «nepripensemaj» — ankoraŭ kredas. La redakcio tamen ne perdas la esperon, ke ne nur la legantoj de *Horizonto*, sed la tuta esperantistaro fine malfermos la okulojn kaj ke la ĝenerala Esperanto-Movado iam retrovos sian antaŭhamburgan dignon. Intertempe *Horizonto* kiel laŭparolilo de la politike neŭtrala zamenhofa esperantismo daŭrigas sian vojon kaj per tio montras, ke almenaŭ parto de la Esperanto-Movado restas partipolitike nekompromitita, fidela al la zamenhofa Esperanto kaj al ideoj de domo nedisigeble ligitaj al ĝi.

### KOMUNIKO PRI LA MANIFESTO 77

Bedaŭrinde, ne estas eble publikigi en tiu ĉi n-ro la promesitan artikolon pri la agadoj entreprenitaj en ligo kun la Manifesto 77 de la Esperanto-Movado: Por Paco en Libereco — Por Libereco en Paco. La kaŭzo estas, ke la manuskriptoj por n-ro 1/78 de *Horizonto* devas atingi la redakcion antaŭ la fino de novembro 1977, sed la Manifesto estas malfermita por apoga kunsubskribo ĝis la fino de decembro. La anoncita analiza artikolo aperos en *Horizonto* n-ro 2/78.

I. L.

# BELETRO

Tristan L'Hermite (1601-1655)

## Le Promenoir des deux Amans

Auprès de cette grotte sombre  
Où l'on respire un air si doux,  
L'onde lutte avec les cailloux  
Et la lumière avecque l'ombre...

L'ombre de cette fleur vermeille,  
Et celle de ces joncs pendans  
Paraissent estre là dedans  
Les songes de l'eau qui sommeille...

Croy mon conseil, chere Climeine,  
Pour laisser arriver le soir,  
Je te prie, alons nous asseoir  
Sur le bord de cette fontaine...

Panche la teste sur cette Onde  
Dont le cristal paroist si noir;  
Je t'y veux faire apercevoir  
L'objet le plus charmant du monde.

Tu ne dois pas estre estonnée  
Si vivant sous tes douces lois  
J'appelle ces beaux yeux mes Rois,  
Mes Astres et ma Destinée.

Bien que ta froideur soit extremes,  
Si, dessous l'habit d'un garçon,  
Tu te voyois de la façon,  
Tu mourrois d'amour pour toy mesme.

Voy mille Amours qui se vont prendre  
Dans les filets de tes cheveux,  
Et d'autres qui cachent leurs feux  
Dessous une si belle cendre.

Cette troupe jeune et folastre  
Si tu pensois la despiter,  
S'iroit soudain precipiter  
Du haut de ces deux monts d'albastre.

Je tremble en voyant ton visage  
Floter avecque mes desirs,  
Tant j'ay de peur que mes soupirs  
Ne luy facent faire naufrage.

De crainte de cette aventure,  
Ne commets pas si librement  
A cet infidele Element  
Tous les tresors de la Nature.

Veux tu par un doux privilege  
Me mettre au dessus des humains?  
Fay mov boire au creux de tes mains,  
Si l'eau n'en dissoust point la neige.

Ah! je n'en puis plus, je me pasme,  
Mon âme est preste à s'envoler;  
Tu viens de me faire avaler  
La moitié moins d'eau que de flame.

Ta bouche d'un baiser humide  
Pourroit amortir ce grand feu:  
De crainte de pecher un peu,  
N'acheve pas un homicide.

## La Promenejo de la du Amantoj

Ce tiu grot', kie malhelas  
Kaj ŝvebas mildo freŝ-aera,  
Kun la ŝtonetoj flu' rivera  
Kaj lumo kun l'ombro kverelas...

L'ombroj de l' ruĝa flor' jasmena  
Kaj de l' pendantaj junkoj dube  
Ondiĝaj ŝajnas tie sube  
La sonĝoj de l'akvo dormema...

Kara Klimena, laŭ ĉi vojo,  
Min kredu, iru ni promeni  
Kaj, dum vespero tardos veni,  
Sidi ĉe l' ŝpruco de ĉi roĝo...

La kapon super tiu fonto,  
Kies kristalo nigras, ŝovu,  
Ke tie vi ekvidi povu  
L'eston plej ĉarman en la mondo.

Ne miru do pri la raporto,  
Ke mi, sub viaj mildaj leĝoj,  
Nomas okulojn viajn Reĝoj  
Kaj Astroj super mia sorto.

Kvankam vi fridas ĝis ekstreml',  
Se vi vin en kostumo vira  
Nur vidus kun ĉi bel' altira,  
De am' vi mortus por vi mem.

Vidu: Amorojn en konsterno  
Milmil via harar' enmaŝas,  
Aliaj siajn fajrojn kaŝas  
Sub tiel bela cindrosterno.

Ĉi dioj junaj kaj fantastaj,  
Se ilin spiti vi dezirus,  
Subite sin deĵeti irus  
De ĉi du montoj alabastraj.

Mi vidas, aĥ! vian vizaĝon  
Flosi kun miaj amdeziroj,  
Car timas, ke miaj vespiroj  
Dronpereigos ĝian naĝon.

Pro tim' de tia aventuro  
Ha, ne konfidu sen atento  
Al nefidinda Elemento  
Ĉiujn trezorojn de l' Naturo!

Pli dolĉe ol favorojn reĝajn,  
Donu, ke super la amsklavoj  
Mi trinku el viaj manĉavoj,  
Se l'akv' ilin ne fandos neĝajn.

Jam troe! Svenas mi de amo,  
L'animo flugas jam Plutonon:  
Al mi glutigis vi duonon  
Malpli da akvo ol da flamo.

Per kis' humida via buŝo  
Povus mildigi ĉi fajregon:  
Nur por eviti etan pekon,  
Ne faru finon al hombuĉo.

J'aurois plus de bonne fortune,  
Caressé d'un jeune Soleil,  
Que celui qui dans le sommeil  
Receut des faveurs de la Lune.

Climeine, ce baiser m'enyvre,  
Cet autre me rend tout transi,  
Si je ne meurs de celui ci,  
Je ne suis pas digne de vivre.

Strofo 5a: aludo al la astrologiaj influoj.

6a: aludo al la legendo de Narciso.

7a: Klimena estas blonda cindre (ni dirus: platinée).

8a: temas, kompreneble, pri ŝiaj mampintoj.

14a: aludo al la legendo de Endimiono.

Mi havus pli feliĉan horon,  
Se min karesus juna Suno,  
Ol tiu, kiu de la Luno  
Guis, dormante, la favoron.

Klimen', ĉi kiso min ekscitas,  
L'alia faras min glacia...  
Se mi ne mortos de ĉi tia,  
Plu vivi mi eĉ ne meritas.

El la franca: *G. Waringhien*

Henryk Wolniak /1939 —/

El la poemaro: «Proch»/«Polvo»  
eld.: «Ossolineum», 1972.

#### leclono de anatomio

La Tero korforma  
pulsanta en aero  
La ombroj ĵetantaj  
la kranion de la sun'

La Tero pene portata  
liganta fragilajn ripojn  
La patro asertis  
pli malofte eksplodas  
kvankam ni ambaŭ estas polv'  
Vi filo stariganta unuan paŝon  
inter la tomboj  
lernu salti sur arboj

#### repaciĝo

Unuaj rozoj elkreskintaj el tomboj  
unuaj larmoj el nestoj de l' vizaĝo  
gutantaj en ĉielon  
Vi Maria levanta la homon el koto  
savu lian skeleton  
estu inter la ripoj  
ŝutiĝanta tero  
plena de fruktoj

El la pola esperantigis  
*Jan Smykalski*

#### RADIOAMATOROJ

Sendormaj noktoj,  
mesaĝoj tra la senfino,  
nevideblaj pontoj  
de solidareco.

Transkontinentaj voĉoj,  
manoj etenditaj  
al la homaro,  
trans la spaco,  
trans la ideoj.

Gefrata reto  
la mondon ĉirkaŭanta,  
egoistan mondon  
senhumanecan.

*Archimede Mingo*  
Elitaligis *Enrico Mingo*

# STILA LECIONO

*Unufoje monate estis kontrolita nia stila kaj gramatika lerteco en la nacia lingvo.*

*Iam post tia provo, kiel kutime, ni ricevis la korektitajn tekstojn.*

*«Tiu kiu skribis pri venĝo, venu al la katedro» — sonis la severa komando.*

*Ciuj rigardis unu la alian. Silento.*

*Mi peze starigis.*

*«De kiu vi pruntis tiujn stultajn ideojn?»*

*«De nia vilaĝa bakisto» — mi respondis timeme.*

*«Kian rilaton havas la bakisto kun tiu diletanta filozofiaĉo?» — ŝi diris kolere.*

*La aliaj lernantinoj singarde moketis,*

*sekvante vigle la kuriozan diskuton.*

*«Li estas lerta homo; li multe legas kaj scias pri ĉio» — mi intencis iel defendi min kaj mian amikon, kiu, sen propra kulpo, estis implikita en tiun situacion.*

*«Via bakisto havas sufiĉan tempon por legi kaj studi, ĉu?»*

*«Jes.»*

*«Kaj eble verki?» — ŝi demandis ironie.*

*«Jes.»*

*«Aŭskultu, kion mi diras al vi: nek via bakisto, nek vi fariĝos verkistoj. Viaj cerboj neniam evoluos.»*

*Kaj jen la rezulto de mia neevoluinta cerbo:*

## Stila leciono

### MEDITADO DE SIA REGINA MOSTO VENĜO

La Venĝo sidis tute sola sur benko, ripozante post streĉa tago. Ŝia reĝina mosto. Ŝi la laboron lasis al siaj helpantoj, al homoj tre spertaj, kiuj posedas fantazion, inteligenton kaj viglecon. Ŝi volas iomete mediti.

Sammomente kun la unua homo ŝi naskiĝis kaj mortos kune kun la lasta. Ŝi vivas senĉese kaj ne maljuniĝas.

Ĉar bezonas ŝin la homoj. Ilia produkto estas ŝi. Ili konstruis por ŝi grandan, nevideblan palacon; ŝin servas ili senpage kaj rekompence ellernas la venĝan spertecon instrui la novan generacion kaj ĝeni siajn kunfratojn. Neniu reĝino en la tuta mondo estas tiel zorgeme ĉirkaŭata, nurtrata kaj amata.

Tamen multfoje la regado ne estas tute simpla. Multfoje oni devas elpensi novajn venĝajn receptojn pli efikajn, ĉar la malnovaj ne plu utilas. Aŭ la frato-kontraŭulo estas tiel forta kaj obstina, ke estas bezonataj specialaj rimedoj. Oni devas cerbumi.

Ŝi devas regi precize la grandan regionon, sendadi per radaro — ŝi pripensis la pasintecon sen la modernaj rimedoj — kaj direkti en homajn ĉelojn diversajn venĝajn receptojn kaj stimulojn laŭ la speculoj al kiuj ili estas aplikotaj.

Ŝi ja ŝatas sian laboron kaj tamen meditas pri la demando, kial la homoj bezonas ŝin. Kio okazus, se ŝi mortus kun la malnova generacio? Ĉu ŝia eterna rivalo kaj malamiko, la boneco, ekposedus ŝian regionon?

Sin kolerigis tiu ĉi stulta ideo. Ĉu homoj posedu nur bonecon? Ĝi estas malmano nomata idioteco; ĉu la granda verkisto Dostojevski ne montris idioton al la homoj? Imagu, ke la tuta homaro estus tia. Ne, ne povas esti.

Se la boneco regus, kian valoran literaturon oni povus krei? Literaturon sen diversaj variaĵoj, sen interesiĝo, sen ekscito; mallonge dirite: sen valoro.

Estu tute certaj pri tio, ke estas ŝia reĝina mosto, kiu kreis literaturon. Ŝi

naskis la regnajjn potencojn, la detruantojn, la venkojn kaj fiaskojn. Ŝi kaŭzis militojn, mortigadojn kaj forlasis nur la ruinojn de pompaj kasteloj. Unuflanke brilas la feliĉo, aliflanke logikas la sufero. Kiu metamorfozas homajn historiojn por ke suferantoj flaru la feliĉon kaj feliĉuloj sentu la suferon?

Ĉu ŝi ne posedas iom da boneco?

Ĉu nur ŝi eksponas la dikajn librojn pri venĝaj projektoj? Kaj per specialaj nevideblaj ondoj ilin radias rekte en la homajn ĉelojn?

La venĝo meditas. Meditas pri la homaro, kiu ne nur estas ŝia eterna sklavo, ĉar sklaveco regas ankaŭ en ĝi mem.

La simbolo de sklaveco estas videbla kateno, fera kateno. Katenoj ne plu ekzistas, sed anstataŭigas ilin nevideblaj riskaj atributoj.

Oni ne rimarkas kiuj efektive estas mastroj kaj kiuj sklavoj.

Sklaveco ekzistas en kiu ajn homa unuiga formo. En la tute simpla duopa unuigo, toleranta aŭ netoleranta, vivas sklaveco kaj mastreco unu apud la alia. Sklavovo uzas rimedojn por defendi sin kaj mastro por regi. Ĉiu el ili defendas sian rajton.

Meditante la Venĝo estas sincera kaj ŝi helpus ilin sen studado pri la homa rajto. Jen ŝia konkludo.

Mastron ĉiam kolerigas sklava defendado, ĉar li forgesas, ke sklavo ne unua atakas, sed nur defendas sin. Aŭ li timas ke supozebla defendado de sklavo renversus mastran pozicion kaj tiu alia fariĝus superulo aŭ ia samgradulo.

Kian logikon la homoj havas! Mastro atakas ĉar li timas agreson de la sama profunde kaŝata aliula aspirpotenco. La Venĝo estas avertita pri tiuj ĉi homaj malfortecoj, ĉar pere de ili ŝi regas.

La venĝo meditas. Kial homoj ambicias kateni aliajn, kaj esti katenitaj de la aliaj? Ĉu ekzistus mastroj, se la alia parto de la homaro sopirus mastri kaj detruu sian

sklavan malfortecon? Ĉu ili atendas oportunan momenton por ŝanĝi la rolon?

La konstato, ke la homaro estas dividita du parte, kaj la konstato, ke preskaŭ en ĉiu homo estas mastremo, konfirmas la fakton pri la eterna batalo inter tiuj ĉi du grupoj, Nevidebla, ruza, amara kaj senĉesa batalo. Mastremuloj montras ne nur emon mastri sole sklavemulojn, sed ankaŭ kateni tiujn, kiuj samnivelas, kaj la aliajn, kiuj serĉas rimedojn por transiri al la mastra grupo.

La Venĝo tiras la konkludon, ke tiu homara divido kaŭzas ŝian regadon.

Sia reĝina moŝto Venĝo daŭrigas la meditadojn.

Pri iuspeculo aspiranta nek mastri, nek sklavumi. La Venĝo mem sentas kompaton por tiu ulo, kiu ne filozofias pri la fakto, ke oni estas devigata, vivante en la unuiĝo, elekti unu el la du homaj grupoj, ĉar tria, laŭ la homa aŭ natura logiko, ne povas ekzisti.

La Venĝo starigas interesan demandon pri tiu speculo staranta antaŭ la dilemo kaj elektanta la mastran grupon; ĉu li ne fariĝu bonintenca mastro? Aŭ havante la potencon en siaj manoj sekvas la eterne konatajn mastrajn pretendojn?

La vorto mastro signifas potencon, ĉu oni ne provu direkti ĝin al bonintenca celo? Sed ne forgesu la fakton, ke la prestiĝo inter mastroj — sola ulo ne povas ja regi la tutan homaron — metas finon al la demando pri la venko de la bonintenca aŭ malbonintenca ideo.

La Venĝo inaŭguris filozofian meditadojn, kiu ofte falas en danĝeron. Sia reĝina moŝto estas devigata ekkoni diversajn rimedojn, ĉu apartenantajn al la scienco, ĉu al simplaj homaj instinktoj. Uzi kion ajn por atingi la celon. Ankaŭ sentojn, bonecon kaj diversajn kvalitojn, ĉar en la nomo de tiuj virtoj la sukceso pli efikas. Homoj tre facile kaj ofte estas trompataj pere de la plej sanktaj ideoj.

La Venĝo meditas pacience pri la primitiveco. Laŭ ŝia opinio ĝia difino estas nuda, senarmila homo defendanta sin kontraŭ ĉio ekster lia lima potenco, sole pere de nekonsciaj naturaj instinktoj.

Lin subpremas nur la forta potenco, kaj ĝin li respektas pro timo. Nesentante sufiĉan potencon ĉe la mastro, la ulo nevideble kontraŭstaras lin. Ĉiam instinkte li timas pli fortan potencon kaj uzas kiel defendon tre ruzajn rimedojn ilustritaj en formo de simplaj incidentoj kvazaŭ

kaŭzitaĵ sen homa intenco. Li posedas bonajn nervojn kaj tre facile eltenas batalon, eĉ eternan. Li estas ĉiam defende preta kontraŭ ĉiu nekonata danĝerulo — kontraŭ la konata li jam produktis defendilojn.

Li estas eterna prahomo el primitiva groto kaj atakas ĉion ekster ĝia limo. Lia supozebla potenco estus senskrupula — li regus nur per instinktoj.

Serĉante la potencon en sia limigita unuiĝo, li ordinare ne renkontas kontraŭstaron. Se li ĝin renkontas kaj supozas, ke kontraŭstaro de aliulo estas la potenco, liaj uzataj rimedoj kaj venĝaj formoj estus tiel fortaj, senĉesaj, precize trafantaj la celon, ke la defendado de kontraŭstarulo devas esti samnivela, se li ne volas kapitulaci. Tre malofte kontraŭulo sukcese eltenas tiun atakon. Se li ĝin eltenas, la historio renversiga. Kontraŭula forteco, en la formo de samspecaj rimedoj, tiel frapas atakanton, ke li kapitulacas. Li ja tre bone konas la efikon de la samaj kontraŭrimedoj.

La Venĝo finis la meditadojn pri la primitiveco, konkludante, ke la ulo heredis de la naturo ne la potencon, sed la ruzcon — tre efika rimedo en la homa vivo.

Ĉu la meditado lacigis la Venĝon? Ĝi daŭrigas ĝin.

Sin interesas intelektuloj. Oni ne forgesu, ke ili posedas ankaŭ primitivecon, kiun ili perfektigis per belstila vortaro kaj per studado. La primitiva instinkto pri regado ne esprimas sin, ĉar nuntempe regas la intelekto. En la konfliktoj rilate defendon kaj atakon, primitivaj instinktoj estas nevideblaj kaj pro tio pli danĝeraj.

Sed aliflanke, la Venĝo mem konfirmas, ke la intelekto plibeligis la sentojn, profundigis animon, kreadis trezoron de la homa scio, plibonigis homajn kondiĉojn kaj ke igis neklerulojn. Ĝi portas en siaj manoj detruilojn kontraŭ la homaro, sed ankaŭ la ŝlosilon de la tera paradizo.

La intelekta meditado tute lacigis la reĝinon. Ŝi montras timon pro ambaŭ hipotezoj.

Homara detruado estas ŝia morto.

Kvankam dubante pri la tera paradizo, ŝi vivas timante, ke la homaro iam ne plu bezonos ŝin.

*Zora Heide*  
Danlando

## IVO LAPENNA

Esperantisto 50 jarojn

En 1928 la studento Ivo Lapenna eklernis Esperanton, la Internacian Lingvon, por kiu li poste sindediĉe laboradas, ĝis nun dum 50 jaroj. Okaze de tiu jubileo de la nun duobla doktoro kaj dufoja profesoro de juro, kelkaj liaj geamikoj kaj kunlaborantoj planas aranĝon omaĝe al li en la kadro de la Konferenco en Jaca.

## MALJUSTAĴO AL INFANOJ

(El «Parkaj rakontoj»)

Estis aŭtuno de la jaro 1938. Multnombra, multbranĉa familio renkontiĝis en varsovia restoracio por preparoli siajn aferojn. Post deserto oni sendis infanojn al parko sub zorgo de gubernistino. Ŝi zorgis pri duopo da ili kaj koleris, ke oni ordonis al ŝi okupiĝi pri la tuta infanaro. Ŝi pensadis kiamaniere tion riproĉi al siaj labordonantoj.

En la parko la infanoj ludis laŭvoĉe, forirante ĉiam pli malproksimen. Subite el flanko aleeto elkuris ĝardengardisto. Li ŝvingadis per bukedo da astroj. «Arogantaj, senhontaj ŝtelistoj. Vi pensas, ke ĉio estas al vi permesita» — li kriis. La infanoj ekstaris kiel fulmtrafitaj. Tiam la gardisto per bastono kun pikilo ekpikis la plej aĝan knabeton. Vidinte tion lia fratino Joanna elŝiris de la gardisto la flo-rojn kaj batis per ili lian vizaĝon ĝis kiam la floroj disŝutiĝis. La gardisto levis la bastonon, sed la infanoj kaptis ĝian pikilon kaj komencis ĝin tiri. Malgranda Andĉej jetis sin teren kaj mordis la gardiston en la tibikarnon, Krysja, ĉarma kiel pupeto, piedbatis per nigra lakŝueto. La gardisto kaptis ŝin je haroj, tiam ŝi eklugis lian vizaĝon per ungoj.

Fariĝis tumulto. Altkreska, eleganta viro forŝiris la bastonon de la gardisto kaj forĵetis ĝin. Forŝovis lin de la infanoj. Joanna ekploreĝis tiel dolore, ke eĉ ne povis kapti spiron. Virino nigre vestita aliris al la altkreska sinjoro kaj diris flustre: «Je propraĵ okuloj mi vidis kiel sinjorino ĉirkaŭ tridekjara en griza robo deŝiris la flo-rojn, forĵetis ilin kaj foriris».

La sinjoro, laŭ indikoj de la infanoj, kondukis ilin al la restoracio, ĉar la gubernistino malaperis. Rikoltinte dankesprimojn li foriris. En la enirpordo li kunpuŝiĝis kun virino ĉirkaŭ tridekjara, grizvestita. Ŝi estis la gubernistino, kiu enkuris en la restoracian salonon kriante: «La infanoj forkuris de mi». La membroj de la familio kontente interrompis siajn debatojn kaj komencis ekzameni la infanojn. «Li suspektis, ke ni ŝtelis la aĉajn flo-rojn» — diris Joanna, sed li alkuris al ni tenante ilin en la mano». «Li povis mem ilin deŝiri, por havi pretekston provokantan la infanojn» — aldonis la gubernistino. Oni netis ŝin, ke ŝi kun la infanoj foriru de ilia tableto.

— «Tion oni ne devas malatenti» — diris patro de Andĉej. — «Ĉiam ili rememoros la malgrandan incidenton en ilia infanaĝo, kiu decide influos ilian vivon».

— «Niaj infanoj batalis, estis grandiozaj, ni diru al ili, ke ĝi estis ilia venko» — proponis patro de Joanna.

— «Kiel vi povas?» — levis la voĉon patrino de Andĉej — la bandito en uniformo nomis ŝtelistino vian filinon! Se la ĝardenisto ne estos forpelita, mi ĉesos kredi je la justeco».

— «Pli mallauĉe! La infanoj aŭdas» — eksiblis patro de Krysja.

— «Ke ili aŭdu! Ke ili sciu, ke ili ne vivas solece en la mondo».

— «Vi hontas antaŭ ili, ke tia, kiel estas, estas la mondo, kaj ke vi estas senpovaj..... Kial do vi kuraĝis fari al ili tian porkecon kaj venigi ilin en tiun ĉi mondon.»

— «Ne ni estas senpovaj» — ekkriegis patro de Andĉej.

— «Vi sentas vin kulpaj rilate al ili. Vi volas ŝajnigi antaŭ ili esti ĉionpovaj, alklini la mondon, plibeligi ĝin» — kriis patro de Joanna.

— «Ili devas ekkredi, ke ekzistas po-vego, kiu regas ekvilibron, ke oni devas al ĝi konfidi kaj kredi» — superkriis patrino de Andĉej.

— Por ili, kvinopo dum jaro aŭ du jaroj ni kreos mondon, justecan kaj ili malkovros tiun nian konspiron en iu timiga momento.

Patro de Andĉej demonstracie foriris al restoracia halo. Li komencis telefoni. Ĉe la tablo ekregis malamika silento. Silentis ankaŭ la infanoj.

Revenis patro de Andĉej.

— «La gardisto estas forpelita. — li diris. Jam oni veturas por forigi lin el la parko.»

Gepatroj de Joanna ekstaris rapide, prenis siajn infanojn kaj neniun adiaŭante foriris. Ili reciproke plu sin ne vidis.

Jaron poste eksplodis la milito. Patro de Andĉej estis militkaptita. Krysja perdis ambaŭ gepatrojn kaj ĝis fino de la milito vivis en orfejo. Patro de Joanna estis mortpafita.

Joanna pensis: — Kial la patro ne kaŭzis, ke oni redungu la ĝardengardiston? Per kio la gardisto vivtenis sin ĝis la milito? Kion li faras nun? Kaj se la milito kaj ĉio, kio trafis ilin okazis pro la ĝardengardisto?

El la pola tradukis  
mag. Anna Dratwer

# PER FORTO DE L' KANTO

De tiam pasis preskaŭ dek jaroj. En mia lando estis okazinta grandioza festivalo kun partopreno de mondfamaj solistoj de ĉiuj muzikaj fakoj kaj specoj. Ne mankis la tenoro Rikardo Taker, la violenisto Isaak Stern. Sed la precipan atentemon de nia muzikema publiko gajnis du maljunuloj: la pianisto Artur Rubinstein kaj la Kataluna violonĉelisto Pablo Casals. La unuaj tri nomoj apartenas al niaj samnacionoj, kiujn ni ofte gastigis en nia lando. Sed Pablo Casals estis por ni nomo konata nur laŭ gazetoj, tial lia koncerto elvokis specialan interesigon.

Dum lia plej lasta koncerto en Tel-Avivo, multfoje de la publiko revokita bisi, tiu ĉi meritplena komponisto adiaŭe aŭdigis kelkajn siajn «Katalunajn melodiojn». Ili elvokis ravan admiron kaj ŝtorman ekstazon de la publiko, kiu jubile aplaudadis.

La gazetoj poste raportis, ke subirinte de la scenejo postkulisojn, Casals rimarkis ke la kortuŝita festivalestro, pro la emociigo elgutis larmojn. Diris al li la maljuna majstro:

— Mi ludis bise la «Katalunajn motivojn» en plena certeco, ke baldaŭ venos la alŝpirata tempo, kiam Hispanio estos libera lando kaj mia patrujo, — Katalunio, ricevos nacian aŭtonomion. Ne scias mi ĝuste, kiam tio ĉi okazos. Verŝajne dum proksima tempo. Vi, judoj, dum du jarmiloj kantadis vian nacian psalmon: «Sur bordoj de la Babelrivero» kaj tial meritigis ricevi liberon en via patrolando. Same okazos al ni, la Katalunanoj, ĉar ni konservis niajn naciajn kantojn!...».

Antaŭ nelonge Katalunio verdire ricevis sian aŭtonomion. Kiel domaĝe estas, ke ĝia bardo kaj patrioto, — Pablo Casals ne ĝisvivis tiun gloran efektiviĝon de siaj naciaj esperoj!

Ankoraŭ ekzistas en Eŭropo ne malmultaj naciaj minoritatoj; eklumu ankaŭ por ili la suno de liberiĝo!

## REKLAMAFIŜO PRI LA JAPANA ELDONO DE RETORIKO



Koran dankon al niaj japanaj samideanoj,  
kiuj sendis ĝin al ni

## ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna

N-ro 11

### 13 LA RILATOJ UEA-UNESKO AŬ PLIA FALSADO DE HISTORIAJ FAKTOJ

13.1 *Unesko en Reykjavik.* — La revuo *Esperanto* kaj aliaj Esperanto-periodaĵoj abunde informis, ke s-ro Amadau-Mahtar M'Bow, la nuna Generala Direktoro de Unesko, ĉeestis la Inaŭguron de la Universala Kongreso en Reykjavik kaj faris tie paroladon en la franca lingvo. La tuta parolado aperis en Esperanto-traduko sur p-oj 144-147 de la organo de UEA (septembro 1977). Necesas atentigi, ke s-ro Amadau-Mahtar M'Bow ne veturis al Reykjavik speciale por partopreni la Kongreson, sed, kiel li mem diris enkonduke, utiligis la okazon de sia oficiala vizito al Islando por alparoli la kongresanojn. Tio per si mem malgravigas la «historian» signifon, kiun la organo de UEA klopodas doni al la parolado per pli ol bombastaj vortoj kaj per komentoj falsantaj historiajn faktojn. La tuta troblovita afero eĉ pli malgravigas, se oni konsideras la nunan karakteron de Unesko, tre malproksiman de la originalaj celoj kaj de la iama prestiĝo, kaj la enhavon de la parolado mem, multrilate ege kontestindan kaj el vidpunkto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj el tiu de la Esperanto-Movado, pri kio eble alian fojon. La ĉeesto de la Generala Direktoro de Unesko en universala kongreso de Esperanto ja estus grava okazaĵo, kvankam certe ne ia «epokfara evento», se Unesko plu estus tio kio ĝi devus esti laŭ sia Konstitucio kaj kio ĝi grandparte fakte estis ĝis la fino de la sesdekaj jaroj, kiam komenciĝis ĝia degenerado.

13.2 *Dekadenco de Unesko.* — Por ke ne okazu kia ajn miskompreno aŭ nova misprezento, utilas memori, ke jam en la decembra numero de *Esperanto* 1970, do precize antaŭ 7 jaroj kaj longe antaŭ la hamburgaĵa evento, mi publikigis artikolon sub la titolo «Kien Iras Unesko?», en kiu estis kritike analizitaj la burokratiĝo, neefikeco, neplenumado de la originala tasko kaj aliaj mankoj en la laboro de Unesko (p. 183). En tiu tempo UEA, kune kun pluraj aliaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) en konsultaj rilatoj kun Unesko, ne kliniĝis servile antaŭ la negativaĵoj en la agadoj de tiu organizaĵo, sed prepostulis ĝian revenon al la originalaj celoj en la sferoj de edukado, scienco kaj kulturo. La artikolo finiĝis per jenaj vortoj:

«Unu afero estas certa: Unesko ne estas tio, kio ĝi devus esti, nek ĝi ludas tiun rolon sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo, kiun ĝiaj iniciatintoj volis doni al ĝi. Nur radikala reformo ne tiom en la strukturo, kion en la metodoj de laboro, povas reestabli la prestiĝon, kiun ĝi ĝuis en la unuaj jaroj post la fondiĝo.»

Tio estis skribita fine de 1970. Malgraŭ la korekta starpunkto de la demokrataj NRO-j kaj la premoj fare de la demokrata publika opinio ĝenerale, Unesko plu politikigadis kaj dekadencis. Tio serioze maltrankviligis plurajn reprezentantojn de NRO-j, kiuj pripensis eĉ la ĉesigon de la konsultaj rilatoj, se la politikiga-dekadenca procezo de Unesko ne estos haltigita. Mi mem, en tiu tempo ŝargita pri la eksteraj rilatoj de UEA, kaj s-ro Jean Thierry, tiutempe reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato de Unesko en Parizo (multe helpata ankaŭ de s-ro André Bourdeaux), opiniis, ke necesas atendi ankoraŭ kelkan tempon, precipe la 18-an sesion de la Generala Konferenco fine de 1974, antaŭ ol fari konkretajn proponojn al la Komitato de UEA pri pliaj premoj por konsciigi Unesko-n pri ĝiaj veraj celoj, aŭ eĉ pri la ĉesigo de la rilatoj, se tiuj klopodoj restus senrezultaj.

La grava 18-a sesio de la Generala Konferenco okazis en Parizo fine de 1974, do post la julia hamburga puĉo. UEA sub la nova gvidantaro tute ne estis reprezentita, nek intervenis en kiu ajn senco. S-ro Amadau-Mahtar M'Bow fariĝis la nova Generala Direktoro. Kun la evidenta celo provi reakiri la perditajn simpatiojn kaj la iaman apogon de multaj NRO-j al Unesko, jam la 30-an de decembro 1974, do tuj post sia enoficiĝo, li dissendis al ĉiuj NRO-j en konsultaj rilatoj flatan cirkuleran leteron, en kiu, interalie, li informis pri «la granda graveco, kiun li donas al la konservo kaj plifortigo de iliaj rilatoj kun Unesko» (Ref. de Unesko DG/7/12/A.311 de la 30-a de decembro 1974). La samon li ripetis en mesaĝoj al internaciaj renkontiĝoj de unuopaj NRO-j, interalie al la Universala Kongreso de Esperanto en Ateno. La organo de UEA misprezentis tiun rutinan mesaĝon kiel ian unikan okazaĵon, kvankam ekde 1954, kiam establiĝis la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko, la Sekretariato regule sendadis siajn mesaĝojn al la UK, kaj en 1953 ĝi eĉ estis reprezentita de oficiala observanto dum la tuta UK en Zagreb (ĉap. 22.3.3 de *Esperanto en Perspektivo*). *Esperanto* de septembro 1976 publikigis la tutan mesaĝon ruĝe enkadrigitan sub diklitera titolo (p. 138), kaj en la oktobra numero de 1977 ĝi skribis: «Tiu mesaĝo enhavis gravan frazon ĝuste pri la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj UEA: 'Mi forte esperas, ke tiuj rilatoj plue plifortigos en la venontaj jaroj'. Kiel oni vidas, tiu «grava frazo», kvazaŭe «ĝuste pri la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko», estas nenio alia ol rutina frazo transkribita preskaŭ laŭvorte el la menciita cirkulero DG/7/12/A.311 adresita al ĉiuj NRO-j. Doni al tia ordinara mesaĝo karakteron de ia senprecedence grava, sensacia evento signifus pro-

fundan humiligon ne nur de UEA, sed de la tuta Esperanto-Movado, eĉ se Unesko ne estus perdinta sian iaman reputacion.

Dum la oficado de la nuna Generala Direktoro, Unesko faris tutan aron da novaj mispaŝoj, kiuj eĉ pli kompromitis ĝin. En 1974 la plimulto en la Generala Konferenco voĉdonis kontraŭ la partopreno de Israelo en la Eŭropa Grupo de Unesko, al kiu, cetero, apartenas ankaŭ Usono kaj Kanado. Tio, kiel ankaŭ pluraj aliaj nete politikaj rezolucioj de Unesko, interalie ankaŭ kontraŭ Israelo (ekzemple pri la arkeologiaj elfaŝaĵoj en Jerusalemo, rilatigo de cionismo al rasismo, k.a.), tute kontraŭaj al la nepolitikaj celoj de Unesko, kaŭzis grandajn tensiojn en Unesko mem kaj profundan ŝokigon en la kulturaj medioj de la mondo. Unu el la rezultoj estis, ke Usono tuj haltigis sian financon kontribuon, kiu estas konsiderinde pli alta, ol tiu de kiu ajn alia Ŝtato-Membro (fakte ĉ. kvarono de la tuta buĝeto de Unesko), kaj sen kiu Unesko tutsimple ne povas funkcii. Nur dum la 19-a sesio de la Generala Konferenco en Nairobi (fine de 1976), kie minacis kompleta kolapso de Unesko ne sole pro ĝia morala kompromitiĝo, sed eble eĉ pli pro la mankantaj 33 milionoj da dolaroj, kiujn Usono ankoraŭ ŝuldis por 1975-76 pro la haltigo de siaj kontribuoj, la t.n. Tria Mondo turnis sian dorson al la soveta bloko kaj Israelo estis allasita en la Eŭropan Grupon. Tiu renversa decido, motivita ĉefe de ekonomiaj bezonoj, estis nur reago je la antaŭaj politikaj decidoj, kio aldonis plian ĉeneron al la longa kaj sufoka ĉeno de politikaj rezolucioj kaj agadoj.

Alia skandalo, rekte tuŝanta ankaŭ la Esperanto-Movadon, rilatis al rezolucio, proponita de la soveta bloko, pri la rimedoj de amasa komunikado. Inter aliaj reakciaj eroj, ĝi enhavis ankaŭ la nun jam misfaman paragrafon 12, laŭ kiu «la ŝtatoj estas respondecaj pri la aktivadoj en internacia sfero de ĉiuj rimedoj de amasa komunikado sub ilia jurisdikcio». La rezolucio celis atingi la aprobon de Unesko al ŝtata kontrolado kaj direktado de la gazetaro kaj de aliaj rimedoj de amasa komunikado, alivorte la plenan transformon de Unesko el laŭkonstitucia monda ĉampiono de homaj rajtoj en mondan subpremanton de la preslibereco kaj de aliaj fundamentaj liberecoj laŭ la Universala Deklaracio. Dum la pariza sesio de la Generala Konferenco (fine de 1974) 41 ŝtatoj apartenantaj al la soveta bloko kaj al la Tria Mondo sukcesis enmeti la proponitan rezolucion en la tagordon de la 19-a sesio en Nairobi (fine de 1976), kio — senprecedence en la historio de Unesko — devigis la reprezentantojn de la okcidentaj demokratioj forlasi la konferencojn, kaj kio estis plia motivo por Usono haltigi siajn kontribuojn. En Nairobi la diskuto reekflamis. La projekto estis forte kritikata dum pluraj tagoj. La usona delegito nomis la presliberecon «gardisto kontraŭ tiranecon», dum la aŭstria delegacio deklaris, ke ĝi kontraŭstaras ĉiujn provojn «direktitajn kontraŭ la liberecon peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn de kiu ajn speco senkonsidere al la landlimoj». Sub tiuj premoj kaj, eble eĉ pli, por rehavigi la esencan usonan financon kontribuon kaj por eviti la verŝajnan disfalon de Unesko, la Generala Konferenco fine decidis per granda plimulto de 78 voĉoj kontraŭ 15 resendi la projekton al speciala komitato por plua traktado kaj revizio. Nur la landoj de la soveta bloko kaj kelkaj disidentaj ŝtatoj en Afriko voĉdonis kontraŭ la plua traktado, sed ĉi-foje malsukcesis.

Tiel, do, prezentiga la nuntempa Unesko: disŝirata de internaj politikaj luktoj, neglektanta siajn verajn celojn kaj tial daŭre sur la rando de abismo.

Estas menciinde, ke en sia parolado en Reykjavik la Generala Direktoro interalie diris:

«Unesko nek havas, nek povas havi specifan politikon pri komunikado, kiun ĝi trudus al la Ŝtatoj-Membroj je nacia nivelo. Tiuj elektas la vojon, kiu ŝajnas plej konforma al la propraj aspiroj» (*Esperanto*, n-ro 9/77, p. 145).

Oni facile rimarkos, ke tiu aserto de la Generala Direktoro de Unesko troviĝas sur la linio de la malakceptebla kaj forĵetita paragrafo 12 de la menciita rezolucio, sed efektive ĝi estas nete kontraŭa al art. 19 de la Universala Deklaracio, al la koncernaj preskriboj de la du internaciaj paktoj pri la homaj rajtoj kaj al nombro da internaciaj konvencioj sur tiu kampo, tial ankaŭ al la originalaj celoj kaj idealoj difinitaj en la Konstitucio kaj Baza Programo de Unesko, inter kiuj elstaran lokon okupas la respekto kaj respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, inkluzive «la rajton peti, ricevi kaj doni informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo *senkonsidere al la landlimoj*» (Art. 19 de la Universala Deklaracio).

La supraj linioj devus esti skribitaj ne de la redaktoro de tiu ĉi rubriko, sed de la estrarano pri la eksteraj rilatoj aŭ de iu alia en la nuna gvidantaro de UEA; kaj tiu teksto devus esti publikigita en *Esperanto*, ne en *Horizonto*. Sed kiom da personoj en la nuna gvidantaro de UEA fakte scias kio estas Unesko hodiaŭ? Kaj se iu hazarde scias kaj volus objektivite prezenti la situacion, kiu hodiaŭ permesus al li aŭ ŝi fari tion en la organo de UEA?!

13.3 *Falsado de historiaj faktoj.* — Sub la titolo «De Konsultado al Kunlaboro» la oktobra *Esperanto* bombaste (kiel kutime) asertas, ke la rilatoj inter UEA kaj Unesko «spertas ne nur simplan revigligon, sed veran renaskigon»; ke «tiu konata formulo

— '(en konsultaj rilatoj kun Unesko)' — komencas liberigi de siaj krampoj kaj transiri el la leterkapoj en la agadprogramojn, ĉi-fije ne sole de UEA, sed ankaŭ en tiujn de Unesko; ke «efektive ne plu temas nur pri konsultaj rilatoj»; ke, fine, «tiuj rilatoj ne plu estas nur konsultaj, ili jam fariĝis kunlaboraj» (p-oj 161-162).

Eĉ senkonsidere al la nuna karaktero de la politikiginta Unesko — do, supozante por momento, ke ĝi plu agas strikte laŭ siaj originalaj celoj — tiuj asertoj estas malveraj kaj grave misgvidaj. Jam la titolo implicas, ke kvazaŭe UEA nun transiris de iu kvazaŭe pala, parenteza «konsulta rilato» al iu kvazaŭe nova, dinamisma kategorio de kunlaboro. Kaj kio pravigas tiujn jubile anoncitan kvazaŭajn «ŝanĝojn»? (kiom da kvazaŭoj jam?): publikigo de broŝuro de Unesko, por kies esperantlingva eldono ĝi kontribuos 2000 guldenojn, kaj eventuale publikigo de Esperanta versio de informilo pri Unesko. Tio estas ĉio, se oni eceptas la distribuon de la parolado de la Generala Direktoro en la franca, kion la Sekretariato rutine faras kun ĉiuj paroladoj de la Generalaj Direktoroj en la lastaj jaroj.

La titolo de la artikolo estas per si mem granda sensencaĵo, ĉar ĝuste la konsultaj rilatoj, havigitaj jam en 1954 kaj poste transformitaj en la prestiĝan kategorion B — ĉio sen kia ajn merito de kiu ajn en la posthamburga gvidantaro de UEA — signifas *kunlaboradon* konforme al la koncernaj Direktivoj. Diference de la aliaj NRO-j, en la kazo de UEA tiujn rilatojn eĉ pli fortikigis la konata Rezolucio de 1954, kiu, inter la aliaj principe gravaj rekonaj rilate la Internacian Lingvon, en p-to IV.1.4.4224 eksplacite «komisiis la Generalan Direktoron... *kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio* en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn» (v. kiun ajn *Jarlibron* de UEA ekde 1955 kaj, pli detale, en ĉap. 22.3.4 kaj 22.3.5 de *EeP*).

La artikolo en *Esperanto* implicas, ke ekde 1954 ĝis la nuna «epokfara» eldono de broŝuro kaj promesita eldono de informilo — absolute nenio okazis en la kadro de la konsultaj rilatoj. La vero, bone konata al ĉiuj, kiuj aktivis aŭ nur sekvis la laboron de UEA inter 1950 kaj 1974, estas facile konstata ankaŭ por aliaj el multnombraj artikoloj kaj Estraraj Raportoj por tiu periodo, el tiutempaj dokumentoj de la ĝis-hamburga CED kaj, tre koncize, el ĉap. 18.5.3 kaj 22 de *Esperanto en Perspektivo* (v. ankaŭ la indeksojn sub «Unesko»). Ĉi tie estu nur supraĵe menciitaj la ampleksaj oficialaj dokumentoj de Unesko pri Esperanto kaj UEA okaze de la pariza kaj montevidea sesioj de la Generala Konferenco de Unesko (1952 kaj 1954), kaj la tre multaj malpli ampleksaj dokumentoj lige kun Esperanto en la daŭro de 20 jaroj; la partopreno de la oficiala observanto de Unesko en la UK de Zagreb (1953) kaj lia raporto al la Sekretariato; Esperanto en la protokoloj de la Generala Konferenco, de ĝiaj komisionoj kaj de la Plenuma Komitato de Unesko; la Rezolucio de 10.12.54, la konsultaj rilatoj kun Unesko (ekde 1954), la pozicio de «konsultiĝoj» kun UN (ekde 1955); la publika debato en Parizo kun reprezentantoj de Unesko (1952); la Universala Ekspozicio de Esperanto en Montevideo (1954) kaj poste en aliaj lokoj (ĉu la nuna gvidantaro jam sukcesis vendi tiujn valoregajn materialojn, kiel ĝi publike proponis?); la dokumentoj de Unesko pri la projekto «Asociigintaj Lernejoj» kun rekomendo de Esperanto, senditaj al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj kaj iliaj Unesko Komisionoj (1955 kaj poste); Esperanto-literaturo en *Index Translationum* de Unesko; afiŝoj de UN kaj, aparte, de Unesko en Esperanto je la kostoj de tiuj organizaĵoj (1957); vere grava artikolo pri Zamenhof en *Unesko Courier* (1959); Zamenhof deklarita «granda personeco de la homaro» fare de Unesko (1959) kaj impona Zamenhof-jaro (v. la verkon de CED *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, 1960); publikigo en Esperantlingva traduko de la verko *Oriente kaj Okcidento al Reciproka Kompreno?* de G. Fradier kun la financa helpo de Unesko (1962); Jaro de Internacia Kunlaboro (1965); Propono al UN kun multmiliono apogo (1966); Jaro de Homaj Rajtoj (1968); akcepto de amendo al la Procedura Regularo de NRO-j konforme al la klopodoj de UEA (1971); Internacia Jaro de la Libro (1972); elstare valora literatura *Serio Oriente-Okcidento* en la kadro de la Ĉefprojekto de Unesko pri la Reciproka Aprecado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj (inter 1961 kaj 1974 aperis 12 volumoj, inter kiuj *La Dia Komedio* de Dante kaj *La Nobla Korano*; ŝajnas, ke ankaŭ tiu serio estas ĉesigita); vastaj mondskalaj kampanjoj per ĉiuj rimedoj de amaskomunikado lige kun la agadoj de UEA ĉe Unesko, UN kaj aliaj organizaĵoj, aŭ rezulte de la Rezolucio de 1954 kaj la konsultaj rilatoj; projekto de Laborplano por la Kontraŭrasisma Jardeko (1974), akceptita de la Komitato en Hamburgo, sed ne realigata de la posthamburga gvidantaro.

La intenca prisilentado de la multnombraj objektivaj atingoj por la Internacia Lingvo en la kadro de la eksteraj rilatoj de UEA dum tiu tuta historia epoko, egalas al falsado de nekontesteblaj faktoj kun la evidenta plurobla celo: (i) senvalorigi la antaŭan grandegan laboron kaj ĝiajn pozitivajn rezultojn; (ii) tiele senkreditigi la antaŭajn respondeculojn kaj la aliajn aktivulojn en la sfero de la eksteraj rilatoj de UEA; (iii) tiamaniere doni al la afero ian «epokfaran», sensacian signifon ekster kia ajn proporcio kun la fakta valoro de la broŝuro kaj promesita alia broŝuro; (iv) samtempe maski aŭ forgesigi la ĉiufankajn malsukcesojn kaj retropaŝojn de la posthamburga gvidantaro, kiuj, inter alia, klare speguligas en la perdo de preskaŭ unu kvinono de la individua membraro de UEA en nuraj tri jaroj.

Verŝajne per tiaj falsadoj oni provizore atingas la celon ĉe neinformitaj kaj tre naj-  
vaj legantoj, sed samtempe oni plu fremdigas de la nuna UEA ĉiujn seriozajn espe-  
rantistojn, kiuj ankoraŭ fidis je elementa intelekta honesteco. En ĉiu okazo falsado  
estas humiliga por UEA kaj tre malutila por la pene atingitaj digno kaj prestiĝo de la  
Esperanto-Movado.

Oni povas starigi plurajn demandojn, ekzemple: kial la nuna estrarano pri eksteraj  
rilatoj ne raportas pri tiaj aferoj kaj kial en plenaj tri jaroj kaj duono li neniam pu-  
blikiĝis unusolan artikolon pri sia koncepto de la eksteraj rilatoj de UEA; ĉu li aŭ  
kolektive la tuta Estraro aprobas tiaspecan skribadon de la redakcio, kiu en ĉiu okazo  
estas respondeca al la Estraro; ĉu en la tuta Komitato de UEA ne troviĝas unusola  
membro, kiu kuraĝas protesti pro tiaj kaj similaj falsadoj, regule publikigataj en la  
organo de UEA?

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 22.3 de *EeP*.

## TRA LA ESPERANTO GAZETARO

Per recenzo en LA BRITA ESPERANTISTO de septembro-oktobro 1977 William Auld  
denove kaj cetere ne sen pravo ditirambas pri la verko de V. Varankin «Metropoliteno»,  
kiun ĵus reeldonis la eldonejo TK. Per tio li montriĝas fidela al la konkludo de sia  
artikolo «Pri forgesita ĉefverko» aperinta en la lasta numero de la nica literatura re-  
vuo: «*Estus grava servo al nia movado* — li tie jam skribis — *reeldoni la supre pres-  
kribitan romanon*». Sed li volonte elektas kiel citaĵon: «*Mi rakontas pri la kasantaj  
sin en mallumaj anguloj klasmalamikoj*», kaj eĉ ne unu demandon li aldiras pri la be-  
daŭrinda malapero de la aŭtoro mem «en mallumaj anguloj» de iu politiko; kiu politi-  
ka mistero datiĝas jam de la t.n. «Granda Purigo» lanĉita en marto 1937!

Dume el la fama tiama sovetiano reaperis prof. S. Podkaminer de Leningrado, kies  
artikolo «*Socialismo kaj Internacia Lingvo*» ĵus estis publikigita de der esperantist  
n.º 83 (3/1977). Oni povus atendi, se ne esperi, ke li klarigos la saman misteron, en  
kiu malaperis liaj tiamaĵ gekamaradoj... Nu, neniel! Male temas pri «pro-domo-a» pledo  
favora al la «*socialisma socio*» kontraŭ la «*kapitalisma socio*». Jen kelke da asertitaj  
aprioraĵoj, per kiuj vi povos juĝi mem pri la neŭtrala agado de la Centra Laborrondo  
de d-ro Detlev Blanke el G.D.R.:

«*La Esperanto-movado ne estas nur lingva, sed ankaŭ esence idea. Ĝi estas plej fir-  
me ligita kun la ideoj de paco kaj amikeco interpopola. Ĉu povas definitive venki tiuj  
ĉi ideoj en la kapitalisma socio, kies regantaj klasoj timas kaj kontraŭbatalas ilin, kiel  
«komunistecajn», timigante ĉiuspecajn filistojn kaj malklerulojn? (...)*

*La kapitalisma sistemo, en ĝia (sic!) imperialisma stadio, karakterizata per akraj  
kaj pliakraĝantaj antagonismaj kontraŭdiroj, interŝtata kaj intermonopola konkurenco,  
agresemo, celanta redividi merkatojn kaj krudaĵ-fontojn per helpo de armiloj, de ko-  
rupcio, politikaj mortigoj, semanta rasismoj, faŝismoj, perforte altrudanta al popoloj  
vivmanieron, kulturon, lingvojn de la fortaj ŝtatoj, ne povas efektiviĝi la definitivan  
venkon de la internacia lingvo.*»

Foje estas deklaroj similaj al spuguloj! Sed krome sekvas memorigo pri la koluzio  
inter «Mondpaca Esperantista Movado» (MEM) kaj la «Tutmonda Pacmovado»: «*En  
1973 (Atentu pri la jaro: ĝuste antaŭ Hamburgo 1974!) dum la tutmonda kongreso de  
pacamaj fortoj en Moskvo, estis subskribitaj dokumentoj pri kunlaboro kaj interhelpo  
de ambaŭ movadoj*». Eĉ ĉe la fino venas admono kun aparta amalĝamo de «Helsinki-  
konferenco»: «*Antaŭ ĉiuj progresemaj Esperanto-organizaĵoj kaj esperantistoj la nuna  
momento starigas jenajn ĉefajn taskojn: ĉiumaniere helpi la realigon de la decidoj de  
Helsinki-konferenco pri sekureco kaj kunlaboro, kolektadon de subskriboj sub la Sto-  
kholma Alvoko pri malgrandigo de la vetarmado kaj malarmigo kaj efektiviĝo de la  
Deklaro pri kunlaboro inter la Tutmonda Pacmovado kaj Mondpaca Esperantista Mo-  
vado*». Sed krom tio, kiel jam skribite de d-ro. W. Bormann, «*Evidentiĝis, ke ne ek-  
zistas kaŭzoj por plendoj kontraŭ iu ajn el la statutoj*». Ĉu do kredendas, ke la Centra  
Laborrondo ne observas sian propran statuton? Ba! Kiel jam konate, ĉio iras glate!

—oOo—

El la ALIGILO por la Kongreso en Varna la anoncitraj kotizoj «evidentiĝas» siaflanke  
neatenditan kurzon de la lev-o: 145 guldenoj tie egalas 40 lev-ojn! Sur kiu bazo  
leviĝis tia ekvivalento? Ĉu la alteco de la okcidentaj kotizoj celas ian kompenso-be-  
zonon?

En INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO (jul-sep. 1977) d-ro A. Bormann recen-  
zis la 2-an eldonon de HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO: «*La dua eldono... estas  
same negativa kaj agresiva kontraŭ la oficiala E-movado (...)* La disidentoj ne sukcesis  
organize displiti la movadon kaj estigi propran organizaĵon. Multaj de la tiame (sic!)  
ŝokitaj ree partoprenas la laborojn de UEA...». Pli false oni ne povas prezenti faktojn!

Denunci deflankiĝon de gvidantoj estas pli pozitiva agado ol maski ĝin sub beligaj vortoj; jen kio certe ne estas «agresiva» kiel la subfosado kaj nukleumado de kultura asocio! Cetere, redukti la «oficialan» E-movadon al la nura UEA, kia aroganta pretendo! Ĉiu bone scias, ke — kiel plurfoje presite en HORIZONTO — ni celis neniam kaj neniel «estigi propran organizaĵon», sed esence defendi la esprimeblecon de libera opinio en la E-movado; kaj ĉiu ja juĝos laŭ la laste citita aserto de d-ro A. Bormann, kiel tiu ĉi prenas sian deziron por jam efektivigita realo! Ba! Kiel skribis d-ro L. Zamenhof, «*kalumniante konstante, oni eĉ anĝelon nigrigas*» (citita en PIV, p. 472)!

Kompense en la rubriko «*ĈU VI LEGIS...?*» de NOVZELANDA ESPERANTISTO (4-1977) kelkaj linioj favore recenzas pri HORIZONTO (jan./feb. 1977): «*...Ne senkaŭze estas unu rubriko trafite titolita «Kion Vi Ne Legos Aliloke».*

Same en l'esperanto (n.º 6 - junio 1977) de la «FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA», post informo laŭ kiu Renato Corsetti kaj Michela Lipari estis nomitaj kiel A-komitatoj de la Federacio en la UEA-Komitato, sekvas la letero de la 11-a de marto 1977, per kiu demisiis la estrarano de la Federacio, Vittorio Dall'Acqua. Inter ĉi ties pluraj motivoj elstaras la unua: «*Mi ne samopinias kun la ideologia, partieca politiko, kiu estas sekvata de la revuo, kio ŝajnigas, ke IEF (la itala Federacio) ĝin alprenis.*

Nu, en l'esperanto (n.º 7-8 - jul.-aŭg. 1977) — ĉar Luigi Tadolini en antaŭa numero 45 nomis «*nekredebla atako*» la artikolon de Vittorio Dall'Acqua «*Deziro kaj realo*» koncerne la partiecon de Renato Corsetti, aperas pri la interveno de Luigi Tadolini protestaj linioj de Pietro Rizzo, kiuj meritas konsideron de ĉiuj esperantistoj... «*...Ĉu estas «neŭtrala» — li demandas — tiu, kiu distingas la specon de la «progresemaĵoj esperantistoj» el la sub-speco de la «neprogresemaĵoj esperantistoj». Tion faras Corsetti. Kvankam li montriĝas ĉampiono de neŭtralismo sin direktante al ni («Faktoj kaj interpretoj», n. 2/3), aliflanke en aliaj verkoj malkaŝas sian efektivan penson. En «Lingue e politica» (eld. Officina, Roma 1976, p. 24) li asertas, ke ni, kiel simplaj ne ideologie karakterizitaj esperantistoj, revas naŭvan miton. Malantaŭ esperanto, kiel malantaŭ la naciaj lingvoj, troviĝas — li diras — la socipolitikaj fortoj, kiuj esprimiĝas fare de la parolantoj; kaj, sen rigora sociologia analizo de la konkurantaj fortoj, tre malfacile la esperantistoj povos atingi la plenan konon de siaj «amikoj» kaj de siaj «malamikoj», kiuj lastaj, laŭ la aserto de Corsetti, estas klarvide la «hegemoniuloj». Sekve, konkludas Corsetti, sen la ŝanĝo de la hegemoniuloj, ne ekzistas espero por la sukceso de esperanto. (Al kio oni povus kontraŭdiri, ke, laŭ la instruo de la historio, al la ŝanĝitaj hegemoniuloj postvenas ĉiam aliaj hegemoniuloj tial, ke fronte al tiu fatalo estas preferindaj la hegemoniuloj, pri kiuj ni estas respondecaj per nia voĉdono al tiuj, kiujn ni devus toleri fare de sklaviga diktatoro. Sed aparte tian nuanceton la argumentado de Corsetti laŭ marksisma vidpunkto reeĝigas la konatan tezon de Stalin, kiu asertis, ke la nura internacia lingvo atingebla estos tiu nature okazanta fare de kunfandiĝo de la popoloj en unikan pololon)... Estas Corsetti tute libera simpatii al la murdistoj de Drezno, de Nekrasov kaj de centoj da aliaj esperantistoj kaj al la torturistoj de nia karmemora Rytkov. Jen la malamikoj kaj hegemoniuloj, kiujn kune kun la naziaj mi konas! Kaj oni ne rebatu, ke la tempoj ŝanĝiĝis: el la neantaŭvidebla konduto de iaj satrapoj oni povas atendi ĉion». Ja ĉu estas «neŭtrala» tiu, kiu distingas la specon de la «progresemaĵoj esperantistoj» disde la sub-speco de la «neprogresemaĵoj esperantistoj»? Kaj tian demandon direktas al la esperantista popolo homo, kiu fidele jam de 57 jaroj senĉese bataladas por la Lingvo! Sed krom tio, kiel jam konate, ĉio iras glate!*

J. T.

## I.ª NACIA GREKA ESPERANTO-KONGRESO

Atheno 22-24 de Aprilo 1978

Iniciatita de la  
Esperanta Societo de Heleninoj

Kunlaboras:  
Supera Helena Esperanta Instituto  
Thesalonika Esperantista Ligo

Konstanta adreso:  
Sokratous 48, Omonia, Atheno (101)

### Oficiala Informilo

Formiĝis organiza komitato el jenaj personoj:

1) Prof. d-ro Stefano Anagnostakis; 2) Anna Andreatou, komercistino; 3) Natasa Bi-niari, pentristino; 4) Georgo Griniatsos, advokato; 5) Kimon Eliopoulos, ekonomikisto; 6) Prof. d-ro ing. Konstantino Koliopoulos; 7) Johano Kotitsas, prof. pri Filozofio (Thesaloniko); 8) Ĥrisula Kujumĝidou, instruistino (Thesaloniko); 9) Sofia Papavasiliopoulou, dom-mastrino (Patre); 10) Despina Papadopoulou, flegistino; 11) Sokratis Sakellaropoulos, kolonelo de Aerarmeo; 12) Adda Sakellaropoulou, dentkuracistino; 13) Helena Vamvakidou, Oficistino.

Provizora programo. — Prelegoj kaj diskutoj pri ĉefa temo: ESPERANTO EN LA LERNEJOJ.

Okazos ankaŭ ekskurso kaj distra programo.

Informas ĉe la konstanta adreso.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

## LIBROJ SUB LA LUPEO

**HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO**, de Ivo Lapenna. Dokumentoj kaj Materialoj pri la kontraŭneŭtraleca Politika Konspiro en Universala Esperanto-Asocio, 152 p., 15 × 21 cm., broŝurita. Dua kompletigita eldono. Kopenhago 1977a.

Leginte la dense dokumentitan kaj klare presitan libron, mi ne povas eviti la eksterigon de unu mia tre malnova suspekto, kiun mi neniam volis konfesi: La estraro de l' socialismaj landoj sabotas la prosperadon de la Internacia Lingvo.

Stalin kaj kompanio unuflanke, kaj Hitler kaj kompanio aliflanke agadis, konsente aŭ ne, akorde kontraŭ ĝi. Pro Esperanto, pro esperantisteco, eĉ mortis gravaj homoj kiel E. Drezen, funkciulo de la soveta ŝtato, kunprezidinto de la Viena S.A.T.-kongreso en 1925a, bona oratoro, tre konata en la S.A.T.-rondoj kaj aŭtoro de Historio de Esperanto. Jan Zawada diris al mi en Varsovio: Drezen estas martiro de Esperanto.

Al la vasta dokumentaro de «Hamburgo en Retrospektivo» mi povas aldoni unu dokumenton: «L'Humanité», organo de la franca komunista partio, ĉirkaŭ la jaroj 1923a-1924a enkorbigis sisteme la sciigojn, novaĵojn, informojn kaj aliajn, kiujn la Esperantista Laborista Grupo de Parizo alsendis. La tiamaj gvidantoj de S.A.T., membroj de la komunista partio, ĝenate, fine decidis iri al ĝia redakto demandi la kaŭzon. Mire ili aŭdis proksimume tion: «Ne konvenas ke la rusoj sciu, kiel oni vivadas alilande».

De tiam pasis pli ol kvindek jaroj, kaj malgraŭ la devizo «Proletarioj unuigu vin», neniu socialisma ŝtato faris eĉ unu pozitivan paŝeton por la Internacia Lingvo, por ke per ĝi oni povu efektive unuiĝi kaj interrilati, ne kiel malsamaj landidoj sed kiel homoj de unu komuna mondo.

Ivo Lapenna, priskribante la nunan situacion de Esperanto malkovras la mil kaj unu manovrojn de la senskrupule ruza politiko enŝoviganta eĉ en nian Aferon, kaj (laŭ mia opinio) celanta, helpate de blindumitaj samideanoj, irigi Esperanton sur la eŝafodon.

«Hamburgo en Retrospektivo» estas — aŭ estos — historia verko. Oni ellegu

ĝin kaj agu tuj konsekvence, ĉar eĉ se tre dolore amaraj, la familianaj larmoj neniam revivigis la mortinton.

Salvador Gumá

**DE TEMPO AL TEMPO**, de Giorgio Silfer. Originalaj poemoj, 85 p., 17 × 24 cm., broŝurita. Librofako de Literatura Foiro, Kuopio-Milano, 1977. Prezo: 10 ned. gld.

Bonŝance, tra naŭdek jaroj manifestiĝis klare diversaj skoloj poeziaj de la esperantlingva beletro. Do forpasis (ĉu ĝustatempe?) antaŭ longe, definitive, la unua epoko de kiam la poetoj kapablis esprimi sin nur per tro klasikaj ŝablonoj, kvankam ĉiu el la plej elstaraj aŭtoroj agordis sian harpon tre persone. Dum multaj jaroj oni verkis preskaŭ ekskluzive per distikoj: ĉiu naskiĝonta poemo estis jam postulanta kontinuaĵajn rimojn, kvazaŭ ne ekzistus alia ebleco aŭ rimedo ol tiu rimi litanie laŭ plej simpla maniero.

Per aliaj skemoj, la rimmuziko iom post iom multe pliriĉiĝis, kaj la versaĵoj disvolviĝis pli kaj pli nature per plej variaj stancoj, jen fiksjaj, jen liberaj. La enhavo kerna ankaŭ progresis laŭ la maturiĝo lingva kaj la nova genia kreado, ja, de virtuojoj. Kaj la inspiro ekliberiĝis sin je korsetoj antaŭjuĝaj, mensaj kaj formaj. Do, ankaŭ la konceptoj. Ĉu la esperantlingva poezio devus neniam evolui samgrade kiel la diversnacia? Feliĉe jam sufiĉe pruviĝis ke niaj poetoj kapablas aliri evolue plej modernan Parnason kaj krei sian propran poetikon kiel atestaĵon de nunaj socikondiĉaj postuloj.

Jus venis tio al mia menso leginte la poemkolekton de Giorgio Silfer «De tempo al tempo». Ĝi konsistas el 27 esperantlingvaj poeziaĵoj kaj 12 aliaj verkitaj laŭ la angla kaj la itala, kaj ankaŭ laŭ itala dialekto. Ŝajnas al mi ke ili estas enpensigeme intimismaj, kaj maturaj fruktoj de simpla esprimbezono kaj inspira sincereco manifestiĝinta, foje, laŭ trajtoj abstraktaj: «Kviet' elanas- / Plaŭdo de l' ondo freŝa / kaj meva kriĉo. / Forpasis unu ŝtormo: / velu apertan maron» (paĝ. 61).

Alifoje la ideoj implikiĝas inter vualoj esoteraj: «Nun / Ankaŭ mi eniris blindan

puton / Kaj palpas la ŝtonojn / Kaj ŝvito sinkas el frunto / Sed neniu / Aŭdas mian krion / Por ke li rakontu» (paĝ. 65).

Ĉiu poemeto estas enkondukita de klariga konciza antaŭparolo kiu bone situigas la leganton al plej taŭga belvedero por ke li pli bone povu elkapti esencon kaj komprenemon, kaj tiel ensekretiĝu en la filozofion de la poeto, kiu esprimas sin, jene, per tiu lastaj versoj:

«Nun ke mi havas / plu nenion por diri, / kaj morne sekas / eĉ la fonto de l' banalo, / per lasta voĉo mia / ekaŭdu

flustron solan: / sevi ne kredas / al Natur' amika / solidaremon veku / en la homo» (paĝ. 83).

La tri mallongaj specimenoj kiujn mi transskribis, klarigas pli bone ol miaj vortoj la esprimivon de G. Silfer. La striktaj versoj kaj strofoj postulas plej «densajn» entekstajn vortojn, kaj tiel la abundaj neologismoj tre efike rolas.

Jen altatona intimisma poemplibro plena je sincereco.

G. Mora



#### ĈEFREDAKTORO DE «VOCO», DISTINGITA

Okaze de la 29-a novembro, la Tago de la Respubliko, la Konsilio de Komunumo Vukovar kutimas distingi lokajn komunumojn kaj unuopajn aktivulojn.

La 24-an de novembro dum solena Kunsido de Asembleo de Komunumo Vukovar, laŭ propono de Loka Komunumo Borovo, estis transdonita al s-ano Dusan ADNADJ, ĉefredaktoro de Jugoslavia Esperanto-Revuo «VOCO», rekono por lia 15-jara Esperanto-agado kaj 5-jara redaktado kaj gvidado de «VOCO».

La Dankleteron enmanigis la prezidento de la Asembleo inĝ. Nenad Krekić en ĉeesto de ĉiuj delegitoj kaj gastoj /pli ol 200 personoj/.

«VOCO»

#### LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.000 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.


#### HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO 30-JARA

La 15-an de decembro 1947, kiam la esperantistoj festis la «Tagon de Zamenhof», niaj samideanoj el Valencio ricevis la premion pro sia sindediĉo kaj entuziasmo por revigligi la movadon en Hispanujo: la Hispana Esperanto-Federacio estis oficiale agnoskita. Malmultaj el ĝiaj fondintoj nun vivas, por ili kaj por kiuj dum tiuj 30 jaroj gvidis la Federacion en Hispanujo nian gratulon kaj koran dankon, ili sciis gvidi ĝin observante la partipolitikan neŭtralecon, kiel decas al Esperanto-movado.

HEF-ano

## VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo  
Ĉiuj inspiritaj de humaneca  
internaciismo



**RETORIKO**, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.000 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 6.50 anglaj pundoj, 65 danaj kr. aŭ egalvaloro.

**ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ**, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 3.50 anglaj pundoj, 35 danaj kr. aŭ egalvaloro.

**AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO**, popularsciencia kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 2.50 angl. pundoj, 25 danaj kr. aŭ egalvaloro.

**ESPERANTO EN PERSPEKTIVO** (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel «enciklopedio de la nuna tempo», tamen ne komplementa sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 212,50 danaj kr. aŭ egalvaloro.

**HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO**, konsiderinde kompletigita eldono ĵus publikigita lukse broŝurita, 152 p., prezo 45 danaj kr., 4,50 anglaj pundoj, 18 germ. markoj, 45 fr. fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 × 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia Libroservo de NEM, Āmosevej 5A, 2700 Brønshøj, Danlando. Kun la escepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe S-ro H. Muller, Mommsenstrasse 5/I Hannover, Germanio; S-ro Jean Thierry, 5, Rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio; F-ino Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza, Hispanio; aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe la eldonejo, Āmosevej 5A, 2700 Brønshøj, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33 % ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj, plus 10 % por sendkosto; 33 % sen sendkosto ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bv. ĉiam aldoni 10 % por la sendkosto.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

# IV.a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Jaca, Hispanujo, de la 22<sup>a</sup> ĝis la 29<sup>a</sup> de Julio 1978  
Sub la aŭspicioj de la Universitato de Zaragoza

Korespondadreso:  
I. Gastón. P.º Marina Moreno, 35, 4.º  
Zaragoza-1. Hispanujo

Konferencejo:  
Palaco de Kongresoj kaj Ekspozicioj

## PLEJ FRESAJ INFORMOJ

**SOLENA MALFERMO.** — La Solena Malfermo de la Konferenco okazos en la ĉefsalono de la Urbodomo.

**PRELEGOJ.** — Jam promesis prelegi Prof. Dro Ivo Lapenna, Dro Paul Neergaard, Dro Juan Régulo Pérez, Dro Miguel Sancho Izquierdo, Dro Jean Thierry.....


**EKSKURSOJ.** — Tuttaga ekskurso al Ordesa, (deklarita Nacia Parko). Aliaj ekskursoj: «San Juan de la Peña» grava, historia monaĥejo, elstaras laŭ rango, pro sia impresa situo sub granda roko en montara kaj belega pejzaĝo. Hecho, Siresa kaj valo de Oza. Oroel. Villanúa (por espeleologoj pro ĝiaj belegaj grottoj).....

**FOLKLORO.** — Prezento de aragonaj folkloraj dancoj kaj kantoj. Filmprezento de la Internacia Folkloro Festivalo de la Pireneo (1977).

**VIZITOJ.** — Gvidataj vizitoj al kulturaj institucioj de Jaca.

**Kiel atingi la urbon?** — La plej proksima Internacia Stacidomo estas Canfranc, je 28 Km. de Jaca. Pluraj trajnoj trapasas Jaca-n, la unua startas de Canfranc je la 9,50 h. kaj alvenas al Jaca je la 10a h. Eksterlandanoj, kiuj deziras veni aviadile devas vojaĝi tra Pau (Francujo).

## JEN MALGRANDA MAPO PRI «JACETANIO»



Desegno: Sicilia

En Jaca, ni povos trankvile kaj komforte labori kaj diskuti la diversajn problemojn, kiujn la ĉeftemoj de la Konferenco prezentos al ni. Sed... Ĉu vi interesiĝas pri arto, historio, sportoj, folkloro...?

En Jaca kaj en la vilaĝoj, kiuj ĉirkaŭas ĝin, vi povos kontentigi viajn emojn. La organiza komitato preparas allogan programon por ĉies gusto.